

AKTOJ de la AKADEMIO

II

1968-1974

Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto – No. 10

AKTOJ de la AKADEMIO

II. 1968 - 1974

2-a eldono

Akademio de Esperanto

Rotterdam 2007

Ĉi tio estas reeldono de la *Aktoj de la Akademio II 1968-1974*, unue publikigitaj en la jaro 1976-a kaj tiam presitaj en Britujo de *The Blackburn Times Press*.

Ni skanis unu el la presitaj versioj, kaj prilaboris la skanaĵon komputile por krei tiun ĉi novan eldonon. Ni provis kiom eble fidele redoni la tipografion de la antaŭa eldono, sed la paĝodivido estas tamen alia en tiu ĉi nova eldono. En la diversaj presitaj versioj de la unua eldono estis ialoke diferencoj. Ni provis en ĉiu tia okazo redoni la plej ĝustan varianton.

En kelkaj okazoj ni aldonis klarigan piednoton. Malgravajn preserarojn ni korektis senkomente.

Ni ŝuldas dankon al multaj personoj, kiuj helpis pri tiu ĉi reeldono. Mi menciu nur kelkajn:

- Michela Lipari, kiu faris la bazan laboron por transformi la tekston en komputilan formon;
- Andreas Kück, kiu kontrollegis la dokumenton kompare kun la originalo;
- Bertilo Wennergren, kiu ankaŭ kontrollegis, kaj kiu aranĝis la tipografion de la nova eldono.

Pri eventuale restantaj eraroj respondecas nur mi, Renato Corsetti, kiu, kiel sekretario de la Akademio de Esperanto, kunordigis la laboron.

Presita en Roterdamo 2007.

ISBN 978-90-811870-2-2

ANTAŬPAROLO

Estas ĉi tie kolektitaj la rezultoj de la laborado de la Akademio de Esperanto dum la montritaj sep jaroj. Mi ne dubas, ke la publiko dece komprenos kaj ŝatos la gravecon de tiuj atingoj, ŝulditaj precipe al la iniciatemo kaj dediĉiteco de la Direktoroj de la Sekcioj pri la Ĝenerala Vortaro kaj pri la Gramatiko, resp. niaj kolegoj A. Albault kaj D. B. Gregor, kiun poste anstataŭis H. A. de Hoog. Estas al mi granda plezuro esprimi al ili tiel merititan dankon.

La broŝuro konsistas el du partoj: la unua entenas la oficialajn tekstojn, laŭstatute voĉdonitajn de la Akademio, la dua la neoficialajn, kiuj, kvankam siatempe komunikitaj al la Akademio kiel indaj je ties konsidero, ne estis submetitaj al formala voĉdono.

En la unua parto troviĝas, krom diversaj administraciaj informoj: 1° La *Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro*. 2° La *Baza Radikaro Oficiala*. Tiuj du dokumentoj celas precipe interharmoniigi kaj oportune klasigi nian oficialan vortotrezoron, tiel ke ĝi pli fidele respegulu la efektivan uzadon de la lingvo, kaj faru ĝian instruadon pli metoda kaj racia. 3° La *Rekomendoj de la Akademio* pri la ĝusta uzado de la refleksivaj pronomo kaj adjektivo kaj pri la senco de “po”.

En la dua parto disponiĝas: 1° Raporto de R. Schwartz pri la uzado de la pasivaj participoj en la Zamenhofa traduko de “La Rabistoj”. Tiu teksto estis komunikita al la Akademio aldone al la Cirkulero No 92, sed ĝi certe meritas pli vastan publikon, prezentante admirindan modelon de scienca esplorado. R. Schwartz ja ne apartenis al nia Akademio, sed sole nur pro sia rifuzo kandidatiĝi; kaj pri li mi volonte ripetus la verson, kiun oni povis legi sur la busto de Moliero, kiam oni ĝin instalis en 1778 en la salono de la franca Akademio:

Rien ne manque à sa gloire, il manquait à la nôtre

(Al lia glor’ nenio, al nia li mem mankas).

2° Du artikoloj de D-ro Albault, pri kiuj la Akademio decidis ilin publikigi en ĉi tiu loko de la “Aktoj”, kun la celo nur informi la publikon, nek aprobante, nek malaprobante liajn proponojn, kaj lasante al la uzado la fiksadon de la definitivaj formoj. 3° Konsultoj de la Prezidanto kaj de la Direktoro de la Gramatika Sekcio pri kelkaj lingvaj punktoj.

Pro la ŝparado postulata de la nuntempaj cirkonstancoj kaj pro la amplekso de la dokumentaro mi ne donas la ciferojn de ĉiuj voĉdonoj nek la nomojn de la voĉdonintoj: mi nur diru, ke tiujn oficialajn tekstojn voĉdonis ĉiujfoje konsiderinda plimulto, ordinaro supera al la du trionoj de la membroj.

La 3an de Junio 1975, la Prezidanto

G. Waringhien.

PARTO OFICIALA

ADMINISTRACIAJ INFORMOJ

A. Statuto

La 10an de Dec. 1970 estis aldonita jena paragrafo, sub la numero 11-A:

Povas fariĝi “korespondantoj de la Akademio” eminentaj personoj, kies okupoj aŭ funkcioj ne permesas al ili regule partopreni en la laboroj de la Akademio, sed kiuj deziras doni al ĝi la apogon de sia nomo. La korespondantoj ricevas ĉiujn akademiajn dokumentojn kaj povas eventuale esti konsultitaj pri lingva demando rilata al ilia specialeco; ili ne havas voĉdonrajton.

Estis de tiam elektitaj Korespondantoj de la Akademio:

Prof. Petr Dinekov, Profesoro ĉe la Sofia Universitato, Membro de la Bulgara Akademio de Sciencoj;

†Prof. Bruno Migliorini, efektiva membro de la Nacia Akademio “dei Lincei” (Romo); honora Prezidanto de la Akademio “della Crusca” (Florenco); efektiva membro de la Toskana Akademio (Florenco); korespondanta membro de la Sveda Akademio de Beletristiko (Stokholmo); korespondanta membro de la Bavara Akademio de la Sciencoj (Munkeno).

B. Konsisto de la Akademio

Dum la koncerna periodo ne okazis ŝanĝoj en la Estraro:

Prezidanto restis G. Waringhien; Vicprezidantoj P. Neergaard kaj A. D. Atanasov; Sekretario R. Bernard.

Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro restis A. Albault.

Ĉe la Sekcio pri la Gramatiko, D. B. Gregor demisiis, kaj en Januaro 1972, estis anstataŭita de H. A. de Hoog.

Ĉe la Sekcio pri la Teknika Vortaro, R. Haferkorn demisiis, kaj, en Septembro 1970, estis anstataŭita de Inĝeniero A. Broise ĝis lia morto en Februaro 1974.

Ĉe la Sekcio pri la Prononcado, C. Støp-Bowitz demisiis kaj, en Aŭgusto 1973, estis anstataŭita de J. Wells.

En Novembro 1972, T. Jung kaj F. Faulhaber demisiis de la Akademio.

C. Listo de la Akademianoj (Majo 1975).

1. laŭ la alfabeto ordo

D-ro A. Albault, 32 Av. Etienne-Billières, 31300 TOULOUSE Francujo

Prof. D-ro P. Ariste, Jakobsoni 7A, TARTU Estonio URSS

S-ro A. D. Atanasov, Vl. Poptomov 48, SOFIA Bulgarujo

Mag. W. Auld, 20 Harviestoun Road, DOLLAR Clacks. FK14 7HG Skotlando

S-ro R. Bernard, Av. de la Marne 4, 92600 ASNIERES Francujo

F-ino M. Boulton, 36 Stockmore str., OXFORD OX4 1JT Britujo

Prof. D. Broadribb, Zürichstr. 166, 8910 AFFOLTERN am ALBIS Svislando

S-ro R. E. Bugge-Paulsen, Dunkersgate 3-A, OSLO 3 Norvegujo

D-rino Cl. Conterno, Viale XXV Aprile 151, 10133 TORINO Italujo

P-ro W. J. Downes, The Manse, Curry Rivel, LANGPORT Britujo

S-ro A. Fernandez, Galglaan 20, 9000 GENT Belgujo

S-ro D. B. Gregor, 34 Watersmeet, NORTHAMPTON NN1 5SQ Britujo
 D-ro S. Ĝuĝev, Bul. Ruski 33, SOFIA Bulgarujo
 Dipl. Inĝ. A. R. Haferkorn, Hermelingsteig 16, 8480 WEIDEN i.d. OBERPFALZ Feder.
 Germanujo.
 S-ro H. A. de Hoog, Braveld 16, 1680 CASTRICUM Nederlando
 Prof. D-ro K. Kalocsay, Nyúl ut. 4-11, 1026 BUDAPEST Hungarujo
 Prof. N. Kawasaki, 11-49 Bandai-higasi, Sumiyosiku, OSAKA Japanujo
 S-ro E. de Kock, 8 Genot str., 6220 DESPATCH C. P. Sud-Afrika Respubliko ^A
 Prof. D-ro I. Lapenna, 77 Grasmere Av., WEMBLEY HA9 8TF Britujo
 D-ro W. Lippmann, Grillparzerstr. 4, 2000 HAMBURG Federacia Germanujo
 D-ro G. Mattos, r. prefeito Angelo Lopez 1718, apt. C-4, CURITIBA Parana Brazilo
 S-ro Mijake Ŝihej, Oozima 4-tyome Danti 2317, Kôtô-ku, TOKIO 136 Japanujo
 Prof. D-ro C. Minnaja, Via Palermo 26, 35100 PADOVA Italujo
 S-ro T. Nakamura, 75 Bunki-cho, Sujaku, Shimokyo-ku KYOTO Japanujo
 Prof. D-ro P. Neergaard, Gothersgade 158, 1123 KØBENHAVN Danujo
 S-ro K. Piĉ, Nerudova 86 5700 LITOMYŠĽ o. Svitavy Ĉeĥoslovakio
 Prof. D-ro J. Régulo Pérez, Apartado 25, LA LAGUNA de TENERIFE Kanariaj Insuloj
 Lekt. J. H. Rosbach, Hulderveien 17B, 1700 SARPSBORG Norvegujo
 Mag. R. Rossetti, 3 Pinfold Lane, MARKET OVERTON n. OAKHAM LE15 7PN / 52 Princes
 Road, Hartshill, STOKE-on-TRENT, Staffs. Britujo ^B
 D-ro I. Rotkviĉ, Cvjetno naselje 21, 41000 ZAGREB Jugoslavio
 D-ro V. Sadler, Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM 3002 Nederlando
 Prof. D-ro V. S. Setälä, Esperanto-tie 4, 02220 IIRISLAHTI Finnlando
 Prof. D-ro G. Sevak, Poŝt-kesto 78, 375010 EREVAN Armenio URSS
 S-ro K. Söderberg, Luthagesplanaden 115-A, 752 25 UPPSALA Svedujo
 D-ro W. A. Solzbacher, 6030 Broad Street, WASHINGTON 20016 D.C. Usono
 Prof. D-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Collets vei 3, OSLO 2 Norvegujo
 S-ro L. Tárkony, Hevesi Gyula ut. 24-VII ép. 1-6, 1156 BUDAPEST Hungarujo
 D-ro K. E. Vilborg, Prästgårdsängen 23, 412 71 GÖTEBORG Svedujo
 Prof. G. Waringhien, 182 Av. Rouget-de-Lisle, apt. G6, 94400 VITRY-sur-SEINE Francujo
 Mag. J. C. Wells, 5 Poplar Road, Merton Park, LONDON SW19 3JR Britujo

Korespondantoj

Prof. D-ro P. Dinekov, ul. L. Karavelov 11, SOFIA Bulgarujo
 †Prof. D-ro B. Migliorini, Via La Marmora 17, 50121 FIRENZE Italujo

2. laŭ la lingvoj

I. ĜERMANA FAMILIO (5 lingvoj, 9 reprezentantoj)

dana: Neergaard

germana: Haferkorn, Lippmann

nederlanda: de Hoog

norvega: Bugge-Paulsen, Rosbach, Støp-Bowitz

sveda: Söderberg. Vilborg

A. En iuj versioj de Aktoj II aperas alia adreso de S-ro E. de Kock. Ni uzis en tiu ĉi eldono tiun adreson, kiu estas la ĝusta laŭ informo de E. de Kock mem.

B. En diversaj versioj de Aktoj II estas du malsamaj adresoj de Mag. R. Rossetti. Ni inkluzivis en tiu ĉi eldono ambaŭ adresojn.

II. SLAVA FAMILIO (3 lingvoj, 5 reprezentantoj)

bulgara: Atanasov, Ĝuĝev

ĉeĥa: Piĉ

serbokroata: Rotkviĉ, Lapenna

III. LATINIDA FAMILIO (4 lingvoj, 8 reprezentantoj)

franca: Albault, Bernard, Waringhien

hispana: Fernandez, Régulo Pérez

itala: Conterno, Minnaja

portugala: Mattos

IV. FINNO-UGRA FAMILIO (3 lingvoj, 4 reprezentantoj)

estona: Ariste

finna: Setälä

hungara: Kalocsay, Tárkony

V. ANGLA KOMPLEKSO (10 reprezentantoj)

Anglujo: Boulton, Downes, Gregor, Rossetti, Sadler, Wells

Skotlando: Auld

Sud-Afriko: de Kock

Usono: Broadribb, Solzbacher

VI. EKSTREM-ORIENTA GRUPO (1 lingvo, 3 reprezentantoj)

japana: Kawasaki, Mijake, Nakamura

VII. ALIAJ LINGVOJ (1 lingvo, 1 reprezentanto).

armena: Sevak

3. laŭ la jaroj

(La elirjaro estas, por ĉiu grupo, la lasta jaro de akademianeco de ĉiuj ties anoj. La interkrampaj ciferoj montras sinsekve la naskiĝjaron de la ano, la jaron de lia esperantistiĝo kaj tiun de la elektiĝo en la Akademion; la kursivaj ciferoj, eventuale, montras la jaron de elektiĝo en la antaŭmilitan Lingvan Komitaton kaj/aŭ en ties Akademion. Oni forigis el ĉiu jara nombro la unuajn du ciferojn).

GRUPO II Elirjaro 1976 Membroj: 14

Ariste (05-21-67)

Boulton (24-49-67)

Conterno (15-34-64)

Fernandez (30-60-73)

Gregor (09-22-64)

Ĝuĝev (02-17-67)

Haferkorn (96-21-57)

de Hoog (10-37-62)

Mijake (01-20-67)

Nakamura (11-29-62)

Rosbach (21-38-62)

Rossetti (09-28-67)

Sevak (04-21-32-64)

Tárkony (02-19-67)

1 vakanta posteno

GRUPO III Elirjaro 1979 Membroj: 12

Albault (23-39-62)

Bugge-Paulsen (91-07-32-49)

Kalocsay (91-12-22-49)

de Kock (30-55-73)

Lippman (95-08-23-23-49)

Mattos (31-49-70)

Sadler (37-51-70)

Setälä (92-06-21-30-49)

Solzbacher (07-21-49)

Støp-Bowitz (13-28-49)

Vilborg (26-40-62)

Wells (39-55-70)

3 vakantaj postenoj**GRUPO I Elirjaro 1982 Membroj: 14**

Atanasov (92-08-64)

Auld (24-34-64)

Bernard (07-31-64)

Broadribb (33-48-73)

Downes (92-23-64)

Kawasaki (02-19-33-49)

Lapenna (09-28-53)

Minnaja (40-40-73)

Neergaard (07-24-35-49)

Pič (20-30-73)

Régulo Pérez (14-33-53)

Rotkvič (01-21-35-49)

Söderberg (03-29-53)

Waringhien (01-16-26-37-49)

1 vakanta posteno**D. Memorpaĝo**

Dum la pasintaj sep jaroj malaperis, bedaŭrataj de siaj kolegoj, jenaj akademianoj aŭ eksakademianoj:

COLLINSON William Edward, angla, mortinta la 5.VI.1969, 80-jara;

OSSAKA Kenĵi, japana, m. la 1.VIII.1969, 81-jara;

BUTLER Montagu Christie, angla, m. la 5.V.1970, 86-jara;

RAKUŠA Rudolf, slovena, m. la 25.V.1970, 77-jara;

BOKAREV Evgenij Aleksejevič, rusa, m. la 11.III.1971, 67-jara;

PUMPR Tomaš, ĉeĥa, m. la 10.IX.1972, 66-jara;

CHAVET Gabriel, franca, m. la 23.XII.1972, 91-jara;

HODAKOWSKI Tadeus Kazimir, pola, m. la 8.X.1972, 69-jara;

CHIUSI Italo, itala, m. la 8.VI.1973, 54-jara;

SONNENFELD Ernest, urugvajana, m. la 27.I.74, 68-jara;

BROISE Auguste, franca, m. la 12.VII.74, 73-jara;

DOMINGUES Carlos, brazilana, m. la 22.11.74, 78-jara;

MIGLIORINI Bruno, itala, m. la 18.VI.75, 79-jara.

KALOCSAY Kálmán, hungara, m. la 27.11.76, 84-jara. ^C

C. Tiu ĉi linio pri Kalocsay Kálmán mankas en iuj versioj de Aktoj II.

OKA OFICIALA ALDONO AL LA UNIVERSALA VORTARO

La celo de ĉi tiu Aldono estas meti ordon en la Fundamentan kaj en la Oficialan Vortaron: ĝi do konsistas el tri partoj: kompletigo de la listo de la Fundamentaj vortoj, aperinta en la Sepa Oficiala Aldono; listeto de radikoj “paralelaj” al aliaj, jam Fundamentaj aŭ Oficialaj, kaj de modifoj al Oficialaj radikoj; listo de novaj oficialaj radikoj, kiuj montris sin relative pli oftaj en la ordinara lingvouzo.

La Direktoro de la Sekcio
pri la Ĝenerala Vortaro,
D-ro A. Albault.

I. FUNDAMENTAJ RADIKOJ

Tiu ĉi parto celas kompletigi la 7an O.A., bazitan sur la laboro de Prof. Waringhien “Inventaro de la Fundamenta kaj Oficiala Vortotrezoro” (“Scienca Revuo” Novembro 1955). La nuna kompletigo uzas la rezulton de la esploroj de D-ro A. Albault “Vortoj el la Fundamento ekster la alfabetvico de la U.V.” (“Scienca Revuo” Novembro 1959); cetere tiuj esploroj estis poste komparitaj kun aliaj similaj de P. Ciliga (“Franca Esperantisto” Majo 59), de E. Wüster (“La Oficiala Radikaro”, 1923) kaj de P. Stojan (“Oficiala Gazeto”, Februaro 1912). Fine, okaze de la editorado de la 9a eldono de la “Fundamento de Esperanto”, D-ro Albault efektivigis plian kontrolon, tia, ke ne ekzistas probable, ke iu Fundamenta vorto ne estus registrita.

En la ĉi-subaj listoj la cifero inter krampoj montras la numeron de la Oficiala Aldono, en kiu tiuj Fundamentaj vortoj estis sisteme kolektitaj.

A.A.

Estas Fundamentaj jenaj radikoj:

A) 12 komunaj radikoj

adres/o	(1)	kilogram/o	(1)
centr/o	(1)	material/o	(1)
frank/o	(1)	metal/o	(1)
general/o	(1)	muzik/o	(1)
jur/o	(3)	oficial/a	(1)
ĵurnal/o	(1)	tekst/o	(1)

RIM.I. En la 7a O.A., inter la komunaj vortoj el la listo de la Fundamentaj radikoj, oni korektu la evidentan preseraron *geograf/o* al *geografi/o*.

RIM.II. Ni presas la Zamenhofan “streketon” inter radiko kaj finaĵo kiel ĉi-supre, por eviti ĉian konfuzon kun apostrofo (vd “Fundamento de Esperanto”, 9a eldono, noto v sur p. 301^Ĉ).

RIM.III. En la dua “Ekzerco de Legado” aperas la formo *deino*: ĝi estas fundamenta, ĉar ĝi troviĝas tie, sed ĝi estis neniam uzita kaj prezentas ian mortnaskitaĵon; ĝi povas deveni de pra-Esperanta radiko (*de-* anstataŭ *di-*) aŭ de simpla preseraro (*deino* anstataŭ *feino*).

Ĉ. La indikita paĝnumero estas malĝusta. La ĝusta numero estas 298.

B) 2 propraj nomoj

Paŭlo

Zamenhof

RIM.IV. La nomo *Zamenhof* komence estis uzata kun apostrofo (ekzemple en la “Unua Libro”); en la Fundamento (fine de la Antaŭparolo) ĝi aperas sen apostrofo, tiel same kiel la virnomo *Vaŝington* (12, 19). Dume oni trovas en la U.V., ĉe *an/*, la urbonomon *Nov-Jork* sen apostrofo, sed en la Ekzercaro (37, L.1) troviĝas *Nov-Jorko*, kie ne povas temi pri preseraro. Fakte temas pri neesprimita licenco al la 16a Regulo pri apostrofado de substantivoj, licenco, laŭ kiu ĉe propraj nomoj povas esti forlasata ne nur la finaĵo de l’ substantivo, sed ankaŭ la apostrofo mem.

RIM.V. En la 7a O.A. staras kiel Fundamenta la virina antaŭnomo *Paŭlino*: oni devas rigardi kiel Fundamentan la radikon *Paŭl*, de kiu ĝi deriviĝas.

II. PARALELAJ FORMOJ. DIVERSAJ ĜUSTIGOJ. LANDNOMOJ

A/ Paralelaj formoj

1. La ses formoj: *alkemio*, *arkaismo*, *arkitekturo*, *kemio*, *mekaniko* kaj *monarko* estas oficialigitaj kiel paralelaj al la Oficiala *alĥemio* kaj al la Fundamentaj *arĥaismo*, *arĥitekturo*, *ĥemio*, *meĥaniko* kaj *monarĥo*.

Estas oficialigitaj la du jenaj duformaj vortoj: *mekanismo* / *meĥanismo* kaj *monarĥio* / *monarkio*.

2. La formo *vipero* troviĝis en la unua eldono de la Universala Vortaro (1894) kaj estis la sola uzata de Zamenhof ĝis 1907. Kiel tia ĝi estas paralela formo al *vipuro* troviĝanta en la Fundamento, kaj povas esti rajte uzata.

3. Estas oficialigitaj la novaj formoj *buĝeto* kaj *proleto* apud la jam oficialaj *budgeto* kaj *proletario*.

La pli simplaj verboj *federi* kaj *riveli* estas oficialigitaj apud la jam oficialaj substantivoj *federacio* kaj *revelacio*.

4. Estas oficialigitaj *sateno* (ia ŝtofo) kaj *atlaso* (kolekto de kartoj, ktp . . .), malgraŭ la jama oficialeco de *atlaso* (= sateno).

5. Pro evoluo en naciaj lingvoj kaj en Esperanto estas oficialigitaj la teknikaj vortoj *difterio* kaj *glukozo*, kiel paralelaj formoj al *difterito* kaj *glikozo*, jam oficialaj sed praktike elirintaj el uzado.

RIM.I. La ĉi-supre cititaj novaj oficialigitaj formoj troviĝas ankaŭ en la tria parto de la nuna Oficiala Aldono.

RIM.II. Ĉiuj formoj deklaritaj kiel “tolerataj” de la Akademio en Junio 67 (Aktoj de la Akademio, 1963-1967, p.73^D) estas nun oficialigitaj, escepte de du: *dekori* kaj *konversi*, kiuj konservas sian kvaliton de “tolerataj”.

B/ Diversaj ĝustigoj

1. La vorto *koncentra* perdas sian oficialecon: ĝian signifon oni jam de longe esprimas per: *samcentra*. Aliparte estas oficialigita la verbo *koncentri* kun la signifoj: “kunvenigi en centron; maldilui”.

D. La paĝnumero 73 estas laŭ la origina eldono de *Aktoj de la Akademio 1963 - 1967*. En la nova eldono de 2007 temas pri paĝo 62.

2. El la substantiva *kutimo* deriviĝas la verbo *kutimi*, kiu regule signifas *havi kutimon*; la signifo *akiri kutimon* jam de longe arkaikiĝis.

3. Apud la Fundamenta substantivo *nulo* estas oficialigita la numeralo *nul*.

4. Laŭ Zamenhof *-aŭ* estas “finaĵo neŭtrala kaj difinita” (“Letero pri la deveno de E-o”). Tamen, malgraŭ diversaj provoj, tiun finaĵon la uzado neniam rigardis elfaligebla, kaj aliflanke ĝi donas agrablan varion de la vortfinaĵoj.

5. Estas oficialigitaj jenaj vortoj: *aristokratio*, *demokratio*, *fotografio*, *litografio* kiel paruloj al la Fundamenta *fotografi* kaj al la Oficialaj: *aristokrato*, *demokrato* kaj *litografi*.

C/ Landnomoj

Konsciante, ke la landnomoj, tiuj tre apartaj propraj nomoj plej ofte jam monde internaciaj, apartenas al du kategorioj de formiĝado: *Lando/landanoj* kaj *homoj/homujo*, la Akademio decidis oficialigi kiel ekzemplojn malgrandan liston de radikoj, kiuj estas sendube internaciaj, tradiciaj en nia lingvo, jam akceptitaj de la granda plimulto. De la unua kategorio oni derivas la nomon de la landano per la sufikso *-ano*; de la dua kategorio oni derivas la nomon de la lando per diversaj rimedoj laŭ la monda internacieco (sufikso *-io*, vorto *lando*, ktp.) aŭ per la Fundamenta sufikso *-ujo*.

1. Oficialigitaj landnomoj

Alĝerio	Irako	Liberio	Paragvajo
Aŭstralio	Irano	Libio	Peruo
Birmo	Irlando	Maroko	Polinezio
Bolivio	Islando	Meksiko	Sirio
Brazilo	Kanado	Nederlando	Sudano
Ekvadoro	Kostariko	Nikaragvo	Tunizio
Gvatemalo	Kubo	Pakistano	Urugvajo
Gvineo	Libano	Panamo	Venezuelo

2. Oficialigitaj landano-nomoj

albano	belgo	estono	hungaro	norvego
arabo	bulgaro	etiopo	italo	rumano
armeno	dano	greko	latvo	svedo

3. La sufikso *-io*

La Akademio, konsiderante, ke la Lingva Komitato, kiam ĝi en 1922 malkonsilis la enkondukon de la sufikso *-io* por formi landnomojn, bazis sian decidon sur la konstato de la tiama uzado;

konstatante, ke nuntempe, malgraŭ tiu oficiala malkonsilo, la uzado de tiu sufikso *-io* ne malkreskis, sed male disvastiĝis;

memorante la vojon, indikitan de Zamenhof en la Antaŭparolo al la Fundamento por ebligi senrompan evoluon de la lingvo, kaj konsistantan en la propono de formo nova, uzebla paralele kun la malnova formo;

opinias, ke la okazo de la sufikso *-io* apud la Fundamenta *-ujo* por ricevi pli internaciajn formojn de landnomoj estas ĝusta apliko de tiu Zamenhofa metodo;

kaj, nuligante la antaŭan malkonsilon de la Lingva Komitato, sed ne ŝanĝante ĝin al rekomendo, lasas al la ĝenerala uzado libere decidi pri la venko de la pli oportuna formo.

RIM. Pri tiu teksto, el 43 membroj de la Akademio voĉdonis 41; ne voĉdonis 2; la demandon pri *-io* jesis 33 kolegoj, neis 5, sin detenis 3.

III. OFICIALAJ RADIKOJ

Pro simpleco la suba listo donas por ĉiu radiko: la kategorion (per la finaĵo), difinon (plej ofte prenitan el “Plena Ilustrita Vortaro”) kaj tradukon en ses lingvoj: angla, franca, germana, hispana, itala kaj portugala (indikitaj per la kutimaj simboloj, respektive A.F.G.H.I.P.)

Rusaj tradukoj estas sub preparado, sed pro tipografiaj malfaciloj ili devos aperi aparte.

La primitiva listo, sur kiu laboris la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro, entenis ankaŭ: la daton de unua apero de ĉiu radiko (granda parto de la nun oficialigitaj vortoj fakte eniris en la lingvon antaŭ la unua Mondmilito, kaj sufiĉe multaj jam antaŭ 1908); la etimologion; sugeston al pli vasta internacieco de la koncernaj vortoj (ĉefe per prezento de tradukoj en tri pliaj lingvoj: nederlanda, pola kaj sveda). Ĝi entenis ankaŭ rusajn tradukojn, sed transliteritaj per latinaj literoj. Tiu aparato ebligis al la Sekcio pli kompetente decidi, kaj la Akademio profitis el tiuj decidoj.

Ĉi tie ni aparte danku la kolegojn, kiuj bonvole kontrolis la tradukojn en la naciaj lingvoj: Broadribb, Downes, Gregor kaj Auld por la angla, Haferkorn, Lippmann, Sonnenfeld por la germana, Sonnenfeld por la hispana, Minnaja por la itala kaj Domingues por la portugala.

A.A.

Afrik/o. La kontinento sude de Eŭropo.—A.Africa, F.Afrique, G.Afrika, H.Africa, I.Africa, P.Africa.

alkemi/o. Moderna formo de: alĥemio.—A.alchemy, F.alchimie, G.Alchimie, H.alquimia, I.alchimia, P.alquimia.

amator/o. Neprofesiulo, kiu amas kaj praktikas ian aktivecon sportan, artan, sciencan...—A.amateur; F.amateur; G.Liebhaber (einer Sache); H.aficionado, (amateur); I.amatore, cultore; P.amador, curioso.

ambasad/o. Ambasadoro kun ties sekvantaro, konsilantaro ktp.—A.embassy, F.ambassade, G.Botschaft (diplomatisches Amt), H.embajada, I.ambasciata, P.embaixada.

Amerik/o. La kontinento inter Atlantiko kaj Pacifiko, konsistanta el tri partoj: Norda, Centra kaj Suda Amerikoj.—A.America, F.Amérique, G.Amerika, H.América, I.America, P.America.

ampol/o. Eta vazo, ordinaro el vitro, uzata interalie a) en kemia laboratorio, b) por hermete enteni medikamentojn, c) por envakue enteni la filamentojn de elektra lampo.—A.phial, ampoule, bulb; F.ampoule, fiole; G.Phiolle, Kolben (chem. Glasgefäß), Ampulle, Glühbirne; H.ampolla, bombilla, pipeta, redoma; I.ampolla, fiala, fialetta, bulbo; P.ampola.

animal/o. Komuna vorto por bestoj kaj homoj, opone al vegetaloj kaj mineraloj.—A.animal (as opposed to vegetable or mineral), F.animal, G.Lebewesen, H.animal, I.animale, P.animal.

aristokrati/o. Reĝimo, en kiu la politika povo apartenas al la aristokrataro.—A.aristocracy (form of government), F.aristocratie, G.Aristokratie, Adelsherrschaft, H.aristocracia, I.aristocrazia, P.aristocracia.

arkaism/o. Moderna formo de: arĥaismo.—A.archaism, obsolete word; F.archaïsme, G.Archaismus, H.arcaísmo, I.arcaismo, P.arcaísmo.

arkitektur/o. Moderna formo de: arĥitekturo.—A.architecture, F.architecture, G.Architektur, H.arquitectura, I.architettura, P.arquitetura.

assemble/o. Interkonsiliĝa aŭ leĝodona instanco aŭ organo de iu organizaĵo, kontraste al la ekzekutiva responda instanco.—A.assembly, F.assemblée, G.Versammlung, H.asamblea, I.assemblea, P.assembléia.

- asist/i.** Pro devo aŭ profesio helpi en fake difinita maniero: *~i kirurgon ĉe operacio; sociala ~antino en fabriko.*—A.to assist (officially), to be in attendance (as experts or advisers), to support, to take part in; F.assister, servir d'assistant; G.beistehen, assistieren; H.asistir, servir de asistente; I.assistere, essere assistente; P.assistir, auxiliar.
- Atlantik/o.** La oceano inter Eŭropo kaj Ameriko.—A.Atlantic, F.l'Atlantique; G.Atlantik, Atlantischer Ozean; H.Atlántico, I.Atlantico, P.Atlântico.
- atlas/o.** Libroforma kolekto de mapoj, desegnaĵoj, bildoj, fotoj ktp. pri aparta temo: *geografia, historia, anatomia, moda ~o.*—A.atlas, F.atlas; G.Atlas, Kartensammlung; H.atlas, I.atlante, P.atlas.
- aŭdac/a.** Riskema fari ion malgraŭ la danĝeroj aŭ malhelpoj.—A.audacious, bold, daring; F.audacieux; G.kühn, verwegen; H.audaz, atrevido; I.audace; P.audaz.
- Aŭstrali/o.** La kontinento de la suda hemisfero okcidente de Pacifiko.—A.Australia, F.Australie, G.Australien, H.Australia, I.Australia, P.Austrália.
- aŭt/o.** Mallongigo de: aŭtomobilo.—A.car, automobile; (US) auto; F.auto; G.Kraftwagen, Auto; H.auto; I.auto; P.auto(móvel).
- aŭtobus/o.** Granda publika aŭtomobila veturilo, kiu transportas pasaĝerojn de stacio al aliaj laŭ difinitaj linioj.—A.motor-bus, bus; F.autobus; G.Autobus, Bus; H.autobús, I.autobus, P.auto-ônibus.
- avantaĝ/o.** Tio, kio donas ian superecon, pli grandan profiton, aŭ enhavas pli grandan utilon, oportunon.—A.advantage; F.avantage; G.Vorteil, Vorzug; H.ventaja, I.vantaggio, P.vantagem.
- avenu/o.** Larĝa strato, ambaŭflanke borderita per arboj, ofte kun perspektivo al monumento aŭ pejzaĝo.—A.avenue, F.avenue; G.Anfahrt, (breite bepflanzte) Strasse, (Avenue); H.avenida, I.viale, P.avenida.
- Azi/o.** La nordhemisfera kontinento, kiu okcidente limas Eŭropon kaj Afrikon.—A.Asia, F.Asie, G.Asien, H.Asia, I.Asia, P.Asia.
- beb/o.** Tre juna infano.—A.baby, F.bébé; G.Säugling, Kleinkind, Baby; H.bebé, “baby”; I.bimbo, bimbetto, (“bebè”); P.bebê.
- bend/o.** Mallarĝa kaj longa peco el ia maldika materio.—A.tape, band; F.bande (d'étoffe, ...); G.Binde, Band, Streifen; H.tira, venda, banda; I.fascia, benda, banda, nastro; P.tira, fita, faixa.
- bovl/o.** Larĝa, duonsfera taso, ordinare el argilo aŭ fajenco.—A.bowl, F.bol, G.(Trink)schale; H.tazón, bol; I.ciotola; P.tijela, escudela.
- bred/i.** 1. Teni kaj reprodukti (bestojn) por la homuzado. 2. Plibonigi kulturformojn de plantoj kaj bestoj produktante novajn per krucado aŭ selekto.—A.to breed; F.élever, produire (bêtes, plantes), améliorer (race); G.züchten, aufziehen; H.criar; I.allevare; P.criar (animais), cultivar (plantas), melhorar (raça).
- buĝet/o.** Detala antaŭkalkulo de en- kaj el-spezoj por difinita periodo, ofte prezentita en formala dokumento.—A.budget, F.budget; G. Haushaltsplan, Budget; H.presupuesto, (“budget”); I.bilancio, preventivo; P.orçamento.
- central/o.** Centra loko, kie oni produktas ion ĉirkaŭe distribueblan (elektron, betonon, ...) aŭ funkciigas telefonan sistemon, aŭ kie oni administras komunan agadon (sindikatoj, partioj, ...). —Acentre (of activity), (generating) station, (telephone)exchange; F.une centrale; G.Zentrale, Kraftwerk, Gewerkschaftszentrale; H.central, I.centrale, P.central.
- cep/o.** Legomo, specio el la genro ajlo, kulturata por sia bulbo (*Allium cepa*).—A.onion, F.oignon (légume), G.Zwiebel, H.cebolla, I.cipolla, P.cebola.
- cirkl/o.** La lokaro de ĉiuj punktoj en ebena, kiuj havas fiksan distancon al donita punkto, nomata la centro.—A.circle, F.cercle, G.Kreis, H.círculo, I.circolo, P.circunferência.

- cirkvit/o.** La vojo, laŭ kiu kurento povas cirkuli.—A.circuit (electric); F.circuit (électrique); G.Stromkreis, Leitung; H.circuito (eléctrico); I.circuito (elettrico); P.circuito (eléctrico).
- demokrati/o.** Reĝimo, en kiu la politika povo apartenas, jen pere, jen senpere, al la popolo, kaj en kiu estas plej fortaj la sendistinge egaligaj tendencoj.—A.democracy, F.démocratie, G.Demokratie, H.democracia, I.democrazia, P.democracia.
- difteri/o.** Moderna formo de: difterito.—A.diphtheria, F.diphthérie, G.Diphtherie, H.difteria, I.difterite, P.difteria.
- distribu/i.** Disdoni al ĉiu laŭ ĝia destino: *~i leterojn, laboron, provianton.*—A.to distribute, F.distribuer; G.ver-, auf-, aus-, zu-teilen; abgeben; H.distribuir, I.distribuire, P.distribuir.
- drat/o.** Tre maldika, fleksebla kaj longa vergo el metalo aŭ alia materio, ordinare kun rinda sekco.—A.wire, F.fil (de métal), G.Draht, H.alambre, I.filo (di metallo); P.fio de metal, arame.
- ekran/o.** Surfaco, kiu haltigas diversajn radiojn aŭ substancojn, ĉu por ŝirmi kontraŭ ilia efiko (*kamena ~o; iks-radia ~o el plumbo*), ĉu por videbligi ilin (*kineja ~o, fluoreska ~o*).—A.screen, F.écran; G.Schutzschirm, Schutzwand, Filmwand, Leuchtschirm; H.pantalla, lienzo; I.schermo, parafuoco, ventola; P.anteparo, biombo, tela (para projecção).
- elektronik/o.** Scienco pri la fenomenoj estigataj de liberaj elektronoj kaj tekniko uzanta tiajn fenomenojn.—A.electronics, F.l'électronique, G.Elektronik, H.electrónica, I.elettronica, P.eletrónica.
- emerit/o.** 1. Oficisto, kiu post difinita tempo de servado forlasas honore la oficon kaj ricevas pension. 2. Pli ĝenerale, persono, kiu retiriĝis de la aktiva vivo.—A.retired person, emeritus; F.un retraité; G.Beamter im Ruhestand, Ruhegehaltsempfänger, (Emeritus); H.jubilado, (emérito); I.pensionato; P.(funcionário) aposentado, reformado, jubilado.
- eskap/i.** Liberigi sin de tio, kio katenas; sukcese eviti per forkuro.—A.to escape; F.échapper, s'échapper; G.entspringen, entwischen, entlaufen, entschlüpfen; H.escapar, escaparse; I.sfuggire, P.escapar.
- etap/o.** Haltoloko, kie oni ripozas aŭ tranoktas, kaj ankaŭ distanco inter du tiaj haltolokoj.—A.stage, halting-place, stopover; F.étape; G.Rastort, Etappe; H.etapa; I.tappa; P.estádio, etapa.
- event/o.** Difinita, sufiĉe grava okazaĵo.—A.event; F.événement (marquant); G.Ereignis, Vorkommen, Vorkommnis, Begebenheit, Geschehen, Geschehnis; H.evento, (acontecimiento imprevisto); I.avvenimento, evento; P.evento, (acontecimento importante).
- fac/o.** Ordinare, ebena parto de surfaco de objekto, limita de pli-malpli difinita figuro; *~o de glitvalvo, de martelo, de amboso, de osto.*—A.face (of an object); F.face (d'un objet); G.Seite, Fläche; H.faz, frente; I.faccia, P.face (mat.).
- farb/o.** Materio, ordinare likva, uzata por ŝmiri surfacon en la intenco ĝin ŝirmi aŭ ĝin kolorigi: *~o el minio; blanke~ita kradaĵo.*—A.paint; F.matière colorante, colorant; G.Farbe, Farbstoff, Färbemittel; H.materia colorante, colorante; I.materia colorante, colorante; P.tinta (para pintar).
- feder/i.** Kunigi ŝtatojn, societojn, sindikatojn aŭ similajn organizaĵojn en federacion.—A.to federate, F.fédérer; G.vereinigen, verbünden; H.federar, I.federare, P.federar.
- film/o.** Bendo kovrita de fotoemulsio; tuto de la bildoj fiksitaj sur tia(j) bendo(j) kaj projekcieblaj sur ekranon.—A.film; F.film, pellicule; G.Film, H.film(e); I.film, pellicola; P.fita, filme.
- fotel/o.** Komforta kaj sufiĉe ampleksa sidilo, kun brak- kaj dors-apogiloj, por unu persono. (Ordinare, la fotelo estas malalta kaj ĉiuflanke kusene remburita, dum la brakseĝo, pli malpeza, havas apartajn brakapogilojn kaj pli similas al ordinara seĝo).—A.easy-chair, armchair, (fauteuil); F.fauteuil; G.Lehnstuhl, (Sessel), (Fauteuil); H.butaca, sillón; I.poltrona, P.poltrona.
- fotografi/o.** Arto de fotografado kaj ĉiuj kun ĝi ligitaj laboroj.—A.photography, F.la photographie; G.Photographie, Lichtbildkunst; H.fotografía, I.fotografía, P.fotografía (arte).

- fuĝi/i.** Forkuri, por savi sin de reala aŭ imagata danĝero.—A.to flee; F.fuir, s'enfuir; G.(ent-)fliehen, flüchten, davonlaufen; H.huir, I.fuggire, P.fugir.
- garaĝo/o.** Konstruaĵo, kie oni tenas, prizorgas aŭ riparas aŭtojn.—A.garage, F.garage, G.Garage; H.cochera, garaje; I.garage, P.garagem.
- glukoz/o.** Tipa glucido, kun dolĉa gusto, trovebla en kelkaj fruktoj (ekz. vinbero); $C_6H_{12}O_6$; plej ofta en la sukeroj, ĝi estas komponanto de tre multaj hidrolizeblaj glucidoj.—A.glucose, F.glucose, G.Glukose, H.glucosa, I.glucosio, P.glicose.
- ĝiri/i.** Transpagi iun sumon el sia konto en la konton de iu alia.—A.to transfer (funds), F.virer; G.übertragen, (girieren); H.girar; I.girare, stornare; P.transferir (com.).
- hangar/o.** Granda ŝirmejo esence formita el metalĉarpenta tegmento subtenata de metalaj fostoj kaj uzata por enteni fojnon, kulturmaŝinojn, aviadilojn, aerostatojn, k.s.—A.hangar, storage building; F.hangar; G.Schuppen, Halle, Hangar; H.cobertizo, hangar; I.tettoi, hangar, capannone, (avio)rimesa; P.hangar.
- heĝo/o.** Barilo el interplektitaj arbedoj.—A.hedge; F.haie, haie vive; G.Hecke, (Hag); H.seto, cerco; I.siepe, chiudenda; P.cerca viva.
- helikopter/o.** Flugmaŝino ekipita per granda vertikalaksa helico kaj kapabla sin levi kaj mallevi vertikale, sin movi en la aero aŭ tie ŝvebi.—A.helicopter, F.hélicoptère, G.Hubschrauber, H.helicóptero, I.elicottero, P.helicóptero.
- humid/a.** Entenanta ian kvanton da likvo aŭ vaporo.—A.damp, humid; F.humide, G.feucht, H.húmedo, (húmido), I.umido, P.úmido.
- impeti/i.** Forte kaj vive sin ĵeti antaŭen.—A.to rush forward, F.s'élancer; G.sich vorwärts stürzen, loststürzen; H.lanzarse, arrojarse, tener ímpetu; I.slanciarsi, avventarsi, scagliarsi, scattare; P.arremeter, arrojarse.
- injekti/i.** Enŝpruci substanco en organismo, aparaton aŭ materialon.—A.to inject, F.injecter; G.einspritzen, injizieren; H.inyectar, I.iniettare, P.injectar.
- interpelaci/i.** (Se paroli pri deputito en parlamento) publike demandi al ministro por ricevi klarigojn pri agoj de la registaro.—A.to interpellate, F.interpeller, G.interpellieren, H.interpelar, I.interpellare, P.interpelar (parlamentar).
- invent/i.** Krei, elpensi ion novan per la forto de la spirito: *~i maŝinon, novan metodon, procedon, modon, kombinon*.—A.to invent, F.inventer, G.erfinden, H.inventar, I.inventare, P.inventar.
- kakt/o.** Planto kun karnecaj tigoj kaj branĉoj, kiuj surhavas skvamojn aŭ pikilojn anstataŭ folioj.—A.cactus, F.cactus, G.Kaktus, H.cacto, cactus, I.cacto, cactus, P.cacto.
- kamion/o.** Granda aŭtomobila veturilo por pezaj ŝarĝoj.—A.lorry, truck; F.camion; G.Lastkraftwagen, Lastauto, Laster; H.camión; I.camion, P.camião, caminhão.
- kanzon/o.** Versaĵo, plej ofte gaja, sprita aŭ moka, konsistanta el egalaj strofoj finiĝantaj per refreno kaj destinita esti kantata.—A.(chanson), (little) song; F.chanson; G.Lied, Gesang, Chanson; H.canción; I.canzone; P.canção, modinha.
- kasked/o.** Ĉapo kun viziero, portata aŭ de uniformuloj, aŭ de civiluloj. RIM.: la kaskedo estas pli plata, iafoje kap-ronda; la kepo estas pli alta, ordinare cilindra.—A.(peaked) cap, F.casquette, G.(Schirm-)Mütze, H.gorra, (casquette), I.berretto, P.boné.
- kejl/o.** Ligna aŭ metala peco, ordinare konusa, uzata anstataŭ najlo, por perforte ŝtopi truon aŭ rigide kunfiksi du partopecojn.—A.peg; F.cheville (de bois); G.Pflock, Zapfen, Keil (Verbindungsteil zum Befestigen—Verkeilen—von Rädern, Riemenscheiben auf Wellen); H.clavija; I.cavicchio, caviglia, cuneo; P.cavilha.
- kemi/o.** Moderna formo de: ĥemio.—A.chemistry, F.chimie, G.Chemie, H.química, I.chimica, P.química.

- kin/o.** Kinematografio, filmarto.—A.cinema, film (as an art form); F.ciné, cinéma; G.Filmkunst; H.cine; I.cinema; P.cinema, cine (arte).
- kirurg/o, (ĥirurg/o).** Specialisto pri kirurgio.—A.surgeon, F.chirurgien, G.Chirurg, H.cirujano, I.chirurgo, P.cirurgião.
- kirurgi/o, (ĥirurgi/o).** Medicina teorio kaj arto kuraci malsanulojn per operacioj.—A.surgery, F.chirurgie, G.Chirurgie, H.cirujía, I.chirurgia, P.cirurgia.
- kolumn/o.** 1. Vertikala dividaĵo de paĝo prezentanta serion da samlongaj linioj skribitaj aŭ presitaj unu sub alia. 2. Vico de objektoj aŭ personoj aranĝitaj unu post aŭ sub alia.—A.column, file (of soldiers), rib (of knitting); F.colonne (de chiffres, de journal), file (de soldats), côte (de tricot); G.Spalte, Reihe, Kolumne; H.columna (de cifras, de diario), filo (de soldados); I.colonna, fila, catasta; P.coluna.
- konced/i.** Post hezito aŭ dubiĝo, konsenti pri la ebleco de io: *mi ~as, ke mia sinteno povas ŝajni mensoga.*—A.to concede; F.concéder; G.einräumen, gewähren, bewilligen; H.conceder; I.concedere; P.conceder, admitir.
- koncentr/i.** 1. Dense kunigi en iun lokon: *~i trupojn, ŝipojn, kaptitojn.* 2. Pliigi la proporcion de solvita substanco en solvaĵo, per relativa forigo de la likvaĵoj: *~ita acido, ~ita lakto, ~ita infuzo.*—A.to concentrate, F.concentrer, G.konzentrieren, H.concentrar, I.concentrare, P.concentrar.
- kontest/i.** Diskute malakcepti aserton, postulon aŭ establitan situacion.—A.to contest; F.contester; G.bestreiten, einwenden, anfechten; H.discutir, negar, impugnar; I.contestare, impugnare; P.contestar.
- kosm/o.** La universo rigardata kiel unu ordigita tuto.—A.cosmos, space; F.cosmos; G.Kosmos, Weltall; H.cosmos; I.cosmo; P.cosmo(s).
- kurent/o.** Fluo de elektro pasanta tra konduktilo: *kontinua ~o, alterna ~o.*—A.current (electric), F.courant (électrique), G.Strom (elektrischer), H.corriente eléctrica), I.corrente (elettrica), P.corrente (elétrica).
- laboratori/o.** Laborejo, destinita por teknikaj aŭ sciencaj esploroj, operacioj, eksperimentoj.—A.laboratory, F.laboratoire, G.Laboratorium, H.laboratorio, I.laboratorio, P.laboratório.
- lap/o.** Specio de arktio kun alkroĉiĝemaj globaj kapituloj (Arctium lappa).—A.burdock; F.bardane, glouteron; G.Klette; H.bardana, lampazo; I.bardana, lappa; P.bardana, pegamassa.
- latitud/o.** La angula distanco, norden aŭ suden, inter unu loko kaj la ekvatoro.—A.latitude, F.latitude, G.geographische Breite, H.latitud, I.latitudine, P.latitude
- licenc/o.** 1. Permeso, donita de registaro aŭ grava organizaĵo al unu el ties anoj, plenumi difinitan socian agadon (presi, instrui, prediki, vendi tian aŭ tian varon, konduki aŭton ...). 2. Escepta malobeo al gramatika aŭ poezia regulo.—A.license, permit; F.licence, permis; G.Erlaubnis, Erlaubnisschein, Lizenz; H.licencia, permiso; I.licenza, permesso, patente; P.licença.
- likv/o.** Substanco, kiu diference de solidoj kaj gasoj alprenas la formon de la ĝin entenanta ujo, sed praktike konservas la saman volumenon ĉe kunpremado: *la tri statoj de la materio estas gaseco, likveco kaj solideco.*—A.a liquid, F.un liquide, G.Flüssigkeit, H.un líquido, I.un liquido, P.líquido.
- litografi/o.** Tekniko kaj arto de litografisto.—A.lithography, F.lithographie (art), G.Lithographie, H.litografia, I.litografia, P.litografia.
- longitud/o.** La angula distanco, mezurata laŭ la ekvatoro, inter la meridiano de loko kaj la origina meridiano, nome la Grenviĉa meridiano por la teraj ~oj, kaj la meridiano de la printempa ekvinoksa punkto por la ĉielaj ~oj.—A.longitude, F.longitude, G.geographische Länge, H.longitud, I.longitudine, P.longitude.

- lotus/o.** Nomo de pluraj vegetaloj, nome: 1/ la *greka* ~o, legumenaco uzata kiel furaĝo; 2/ la *nordafrika* ~o, arbo el kies nigra kaj malmola ligno oni fabrikis flutojn kaj kies fruktojn manĝis la Lotofagoj, specio el zizifoj (*Zizyphus lotus*); 3/ la *egipta* ~o, nimfeo ankaŭ nomata Nila lilio (*Nymphæa lotus*, *N.caerulea*); 4/ la *hinda* ~o, nimfeaco, sankta signo de la budhismo (*Nelumbium speciosum*).—A.lotus, F.lotus, G.Lotos, Lotosblume, H.loto, I.loto, P.loto, lotus, lódão.
- lubrik/i.** Meti substancon speciale glitigeman inter du frotiĝantajn surfacojn, por faciligi la glitadon.—A.to lubricate; F.lubrifier; G.schmieren, einölen; H.lubricar, lubrificar; I.lubrificare; P.lubrificar.
- luk/o.** Aperturo, pli-malpli trairebla de homo, destinata al enlaso de lumo aŭ aero aŭ al simpla traŭro, diversmaniere fermebla, kaj trovebla interalie: 1/ en domo: a) ĉe la tegmento: *tegmento~o*, *mansardo~o*; b) ĉe la plafono aŭ planko: *klapo~o*; c) en la kelo: *kelo~o* (Kp.: *ventotruo*); 2/ en ŝipo: a) sur la ferdeko: *ferdeko~o* (Kp. *ferdekpordo*); b) ĉe la ŝeloparieto: *ŝipo~o* (tre ofte ronda); 3/ sur ŝoseo aŭ trotuaro: *kloak~o* k.s. (Kp. *rigardilo*, *aperturo*).—A.1/a) dormer-window, b) trap-door, c) air-hole, ventilator; 2/a) hatchway, b) port-hole; 3/ man-hole; F.1/a) lucarne, b) trappe, c) soupirail; 2/a) écoutille, b) hublot; 3/ ouverture d' accès, trou d'homme; G.1/a) Dachluke, b) Falltür, Klapptür, c) Kellerloch; 2/a) Deckluke, b) Bullauge; 3/ Einsteigöffnung, Mannloch; H. 1/a) lumbrera, b) trampa, c) toma de luz; 2/a) escotilla, b) portilla, tragaluz; 3/ orificio de acceso, boca de entrada; I.1/a) abbaino, finestrella (sul tetto), b) trappola, c) pozzo di luce; 2/a) boccaporto, b) obló, sportello; 3/ bocca d'accesso; P.1/a) trapeira, b) olho-de-boi, c) lumieiro, claraboia; 2/a) escotilha, b) vigia; 3/ boca de bueiro.
- map/o.** Folio, sur kiu estas konvencie figurita jen pli-malpli granda parto de la tergloba surfaco, jen porcio de la astra ĉielo.—A.map; F.carte (géographique. céleste); G.Landkarte, Himmelskarte; H.mapa; I.carta, cartina (geografica), mappa; P.mapa (geog.).
- Mediterrane/o.** Granda maro, fermita inter Eŭropo, Afriko kaj Azio.—A.Mediterranean, F.Méditerranée, G.Mittelmeer, H.Mediterráneo, I.Mediterraneo. P.Mediterrâneo.
- meĥanizm/o, mekanizm/o.** Sistemo de organoj aŭ pecoj, kiuj kunefikas en maŝino aŭ aparato, aŭ en biologia proceso, por atingi difinitan rezulton.—A.mechanism; F.mécanisme; G.Mechanismus, Getriebe, Vorrichtung; H.mecanismo; I.congegno, meccanismo; P.mecanismo.
- mekanik/o.** Moderna formo de: meĥaniko.—A.mechanics, F.la mécanique, G. Mechanik, H.mecánica, I.meccanica, P.mecânica.
- metalurgi/o.** Industrio, celanta elfosadon de minaĵoj kaj ekstraktadon, fabrikadon kaj prilaboradon de metaloj.—A.metallurgy, F.métallurgie, G.Metallurgie, Hüttenwesen, H.metalurgia, I.metalurgia, P.metalurgia.
- ministeri/o.** Tuto de la oficejoj kaj oficistoj de iu ministra fako, kaj domego, kie ili troviĝas.—A.ministry (pol.), F.ministère, G.Ministerium, H.ministerio, I.ministero, P.ministério.
- minus.** Konjunkcio kaj adverbo, indikanta resp. subtrahon aŭ negativan nombron.—A.minus; F.moins (math.); G. weniger, minus; H.menos; I.meno; P.menos.
- mistifik/i.** Ŝercrompi iun, trouzante lian kredemon.—A.to hoax, to fool; F.mystifier, berner; G.mystifizieren, foppen, zum besten halten; H.ambaucar, engañar, mofar, (mixtificar, mistificar); I.corbellare, turlupinare; P.mistificar, burlar, ludibriar.
- monark/o.** Moderna formo de: monarĥo.—A.monarch, F.monarque, G.Monarch, H.monarca, I.monarca, P.monarca.
- monarki/o, (monarĥi/o).** Reĝimo de regno regata de monarĥo (monarko) kaj tia regno: *absoluta*, *konstitucia*, *demokratia* ~o.—A.monarchy, F.monarchie, G.Monarchie, H.monarquía, I.monarchia, P.monarquía.

- moskit/o.** Komuna nomo por pikantaj dipteraj insektoj, precipe el la familio de kuledoj.—A.mosquito; F.moustique; G.Moskito, Stechmücke, Schnake; H.mosquito; I.zanzara; P.mosquito, pernilongo.
- multiplik/i.** Fari ~on, t.e. el du nombroj A kaj B, nomataj ~ato kaj ~anto, ricevi trian P nomatan produkto; la produkto P de la du entjeroj A kaj B estas la adicio de B nombroj, ĉiuj egalaj al A.—A.to multiply, F.multiplier (math.), G.multiplizieren, H.multiplificar (mat.), I.moltiplicare (mat.), P.multiplicar (mat.).
- muzel/o.** Elstara parto de la kapo de tiuj bestoj, ĉe kiuj la nazo kaj buŝo elpintiĝas el la vizaĝo: ~o de hundo, de kato, de ezoko.—A.muzzle, snout (of animals, fish); F.museau, mufle, groin, boutoir; G.Schnauze, Maul; H.hocico, morro, jeta; I.muso, ceffo; P.focinho.
- nadl/o.** Pintforma metala vergeto elfarita por diversaj uzoj, sed ne por kudri.—A.needle, F.aiguille, G.Nadel, H.aguja, I.ago, P.agulha (téc.).
- neglekt/i.** Lasi ne farita, ne atentata, ne zorgita.—A.to neglect; F.négliger; G.vernachlässigen, unterlassen, versäumen; H.descuidar; I.trascurare, tralasciare, negligere; P.negligenciar, desleixar, descuidar, descurar.
- nervoz/a.** Havanta facile eksciteblan maltrankviliĝeman psikon.—A.nervous, fidgety, excitable, highly-strung; F.nerveux, (excitable); G.nervös, erregt, erregbar; H.nervioso (de nervios irritables); I.nervoso; P.nervoso, irritável, exaltado.
- nilon/o.** Nitrogenhava sinteza kombinaĵo, analoga al la plasto, el kiu oni faras i.a. specon de artefarita silko.—A.nylon, F.nylon, G.Nylon, H.nilón, “nylon”, I.nailon, “nylon”, P.“nylon”.
- nul.** La nombrosigno 0 (radiko de la Fundamenta: nul/o).—A.zero, nought, nil; F.zéro; G.Null; H.cero; I.zero; P.zero.
- obstakl/o.** Tio, kio malhelpas aŭ malfruigas la iradon (propre aŭ figure).—A.obstacle, hindrance; F.obstacle, empêchement; G.Hindernis, Erschwerung; H.obstáculo; I.ostacolo; P.obstáculo, empecilho, embaraço.
- ofert/i.** Proponi (varon aŭ servon) al kliento: *la leĝo pri ~o kaj mendo*.—A.to offer, to tender (for sale or supply); F.offrir (commerce); G.anbieten, feilbieten, offerieren; H.ofrecer (oferta), ofertar; I.offrire; P.oferecer (com.)
- opon/i.** Esprimi opinion kontraŭan al la opinio de iu alia kaj peni, ke tiu ne povu efektiviĝi la sian.—A.to oppose; F.s'opposer à, aller contre, contrecarrer; G.entgegenstellen, entgegen, opponieren; H.oponer; I.opporsi; P.opor-se.
- ort/o.** 90-grada angulo: se du rektoj kruciĝas, tiel ke du apudaj anguloj estas egalaj, ili determinas kvar ortojn.—A.right angle; F.angle droit, un droit; G.rechter Winkel, Rechter; H.ángulo recto, recto; I.angolo retto; P.ángulo reto.
- Pacifik/o.** La Oceano inter Ameriko, Azio kaj Oceanio.—A.The Pacific; F.le Pacifique; G.der Stille Ozean, der Pazifik; H.el Pacífico; I.il Pacifico; P.o Pacífico.
- pane/o.** Akcidenta nefunkciado de aparato aŭ de motorveturilo.—A.breakdown, failure; F.panne (tech.); G.Panne, Störung, Schaden, Defekt; H.avería; I.panna, panne, guasto (meccanico), avaria; P.pane.
- paraŝut/o.** Ombrelforma aparato, kiu uzas la aeran reziston por malrapidigi la malsupreniĝon de falanta korpo.—A.parachute, F.parachute, G.Fallschirm, H.paracaídas, I.paracadute, P.pára-quedas.
- plast/o.** Genra nomo de makromolekulaj sintezaj materioj, transformeblaj per diversaj procedoj ordinare uzantaj varmon kaj premon.—A.plastic (material); F.matière plastique, un plastique; G.Kunststoff, Pressstoff, Kunstharz; H.material plástico, plástico; I.materia plastica; P.matéria plastica, plástico.

- plongĝ/i.** Lerte sin ĵeti en akvon, por naĝi.—A.to dive, to plunge, F.plonger, G.tauchen, H.zambullir, I.tuffarsi, P.mergulhar.
- plus.** Konjunkcio kaj adverbo, indikanta resp. adicon aŭ pozitivan nombron.—A.plus, F.plus (math.), G.plus, H.más, I.più, P.mais (mat.).
- preleg/i.** Fari kiel kompetentulo instruan aŭ klerigan paroladon pri sufiĉe grava temo.—A.to lecture; F.faire une conférence; G.einen Vortrag (Vorlesung) halten; H.tener una conferencia (lección, discurso); I.fare una conferenza; P.fazer preleção.
- preskrib/i.** (pp leĝoj aŭ kuracistoj) Formale kaj aŭtoritate ordoni.—A.to prescribe F.prescrire, G.vorschreiben, verschreiben, H.prescribir, I.prescrivere, P.prescrever.
- prolet/o.** Moderna formo de: proletario.—A.proletarian, F.prolétaire, G.Proletarier, (Prolet), H.proletario, I.proletario, P.proletário.
- radiator/o.** Aparato—ordinare tubaro entenanta akvon, oleon, vaporon aŭ varman aeron—aŭ maŝinorgano, kiu disradias varmon ĉirkaŭ si, ĉu por hejti lokon, ĉu por malvarmigi maŝinparton aŭ sistemon (kiel ekz-e: eksplod-motoron); ankaŭ elektra hejtilo.—A.radiator, F.radiateur, G.Heizkörper, Kühler, H.radiador, I.radiatore, P.radiador.
- reflekt/i.** (pp surfaco de korpo) Fari, ke trafanta lumradio, sonondo k.a. ne penetru en iun surfacon, sed ŝanĝu sian direkton al direkto simetria rilate al la ortanto ĉe la trafpunkto.—A.to reflect (phys.); F.réfléchir (lumière), renvoyer (son); G.zurückstrahlen, zurückwerfen, reflektieren; H.reflejar, reflectar; I.riflettere, P.reflectir.
- rivel/i.** Aperigi tion, kio estis nekonata, sekreta aŭ nevidebla: *~i planon, misteron; ~i foton per kemia bano.*—A.to reveal, to develop (phot.); F.révêler, développer (photo); G.enthüllen, aufdecken, entwickeln; H.revelar; I.rivelare, sviluppate; P.revelar.
- rivolu/o.** Rotacio de 360°: *la tero ~as ĉirkaŭ sia akso en 24 horoj kaj ĉirkaŭ la suno en iom pli ol 365 tagoj.*—A.revolution (around an axis); F.révolution (méc., géom.), tour (d'hélice); G.Tour, Umdrehung, Umlauf, Rotation; H.revolución (mec., geom.), vuelta; I.rivoluzione (mec., geom.); P.revolução (mec., geom.).
- sandviĉ/o.** Manĝaĵo, konsistanta el ia nutraĵo metita inter du pantranĉoj.—A.sandwich; F.sandwich; G.Sandwich, belegtes Brötchen, Doppelschnitte; H.“sandwich”, emparedado; I.“sandwich”, panino imbottito, panino gravido; P.sanduíche.
- sateno/o.** Ĉefe silka, kaj nun nilona, sed ankaŭ lana, kotona ... teksaĵo, de kiu unu flanko estas glata kaj brila.—A.satin; F.satin; G.Satin, Atlas; H.raso, satén, satín; I.raso, “satin”; P.cetim.
- sens/o.** Ĉiu el la specialaj korpaj kapabloj de homo aŭ de animalo, per kiuj tiu ricevas sciigojn pri iaj elementoj, fizikaj aŭ kemiaj, de la ekstera medio aŭ de la interna medio: *vidado, aŭdado, flarado, gustumado kaj tuŝado estas la kvin klasikaj ~oj; muskola ~o, ekvilibro~o.*—A.sense (the five senses), F.sens (les cinq sens), G.Sinn (die fünf Sinne), H.sentido (los cinco sentidos), I.senso (i cinque sensi), P.sentido (os cinco sentidos).
- sin/o.** Homa brusto, rigardata kiel formanta kun la brakoj aŭ femuroj ian varman ŝirmejon.—A.bosom, breast, lap; F.sein, giron; G.Busen, Brust, Schoss; H.seno, regazo; I.seno, petto; P.seio, regaço.
- singular/o.** Gramatika nombro, montranta, ke oni parolas pri ununura persono aŭ afero.—A.the singular, F.le singulier (gram.), G.Einzahl, Singular, H.el singular, I.il singolare, P.singular.
- situ/o.** Loko rigardata konsidere al la kondiĉoj, kiujn ĝi prezentis aŭ prezentas por la starigo de homloĝejoj (naturo de la grundo, ebloj de vivtenado, defendorimedoj, ktp).—A.site, situation, position; F.site, situation (géo.), position, assiette (d'une ville); G.Lage, Situation; H.sitio, situación, posición, asiento; I.sito, situazione, posizione; P.situação, localização.

- ski/o.** Ĉiu peco el paro da lignaj, plastaj aŭ metalaj tabuloj, longaj ĉ. du metrojn, larĝaj 7 ĝis 9 centimetrojn, kun suprenkurbita antaŭa ekstremaĵo, kiun oni alfiksis al ĉiu ŝuo kaj per kiu oni glitas sur la neĝo.—A.ski, F.ski, G.Ski, Schi, H.esquí, I.sci, P.esqui.
- sled/o.** Veturilo, provizita per glitiloj anstataŭ radoj, uzata por transporti ŝarĝojn aŭ homojn, tirata de ĉevaloj, hundoj, boacoj, aŭ puŝata de homo.—A.sled, sledge, sleigh; F.traîneau, (schlitte); G.Schlitten; H.trineo; I.slitta; P.trenó.
- sorg/o.** Grava greno, multe kulturata en varmaj sekaj regionoj por produktado de faruno, sukero, siropo, alkoholo ktp. (Andropogon sorghum).—A.sorghum, F.sorgho, sorgum, G.Sorghum, Mohrenhirse, H.sorgo, I.sorgo, P.sorgo.
- spur/o.** Postlasita enpremo, marko, signo, dank' al kiu eblas diveni, kien iu aŭ io pasis, aŭ kion iu faris, aŭ kio (fizike) okazis.—A.spoor, footprint, track, trace, trail; F.trace, empreinte, vestige, indice; G.Spur; H.huella, pisada, impresión, indicio; I.traccia, orma, indicio; P.indício.
- stadion/o.** Loko, destinita kaj taŭge aranĝita por atletaj aŭ sportaj ekzercoj kaj konkursoj, kun multaj ŝtupaj vicoj da sidlokoj por la publiko.—A.stadium, F.stade (sport), G.Stadion, Sportplatz, H.estadio (deporte), I.stadio, P.estádio, campo (de esportes).
- start/i.** (netransitiva) 1.Komenci sportan agadon en konkuro. 2. (pp motoro ks.) Ekfunkcii.—A.to start (in a race etc., intr.), 2.to start up (intr.); F.1/ partir (coureur), démarrer, prendre le départ, 2/démarrer; G.1/2/ starten; H.1/arrancar, salir, emprender la marcha, 2/arrancar; I.1/partire, prendere il via, 2/avviarsi; P.1/arrancar, partir, pôr-se em marcha, 2/pôr-se em movimento.
- subtrah/i** (nombron de alia nombro) Trovi la diferencon de la dua nombro per la unua nombro.—A.to subtract, F.soustraire, G.subtrahieren, abziehen, H.subtraer, restar, I.sottrarre, P.subtrair (mat.).
- suplement/o.** Kompletiga aldono.—A.supplement, F.supplément, G.Ergänzung, Nachtrag, H.suplemento, I.supplemento, P.suplemento.
- surfaco/o.** Lokaro de la punktoj limantaj porcion de spaco aŭ solidon en la spaco.—A.surface, F.surface, G.Oberfläche, H.superficie, I.superficie, P.superficie.
- ŝoforo/o.** Profesia kondukisto de aŭtomobilo, kamiono k.s.—A.chauffeur; F.chauffeur; G.Fahrer, Chauffeur, Schofför; H.“chauffeur”, chófer, conductor: I.autista, guidatore; P.chofer, motorista.
- tajl/i.** Doni difinitan formon al materialo, tute aparte al ŝtofo, tranĉante el ĝi pecojn aŭ eretojn: ~i *ŝtonon, gemon, ŝtofon*.—A.to cut, cut to shape; to form; F.tailler; G.zuschneiden, zustutzen, anspitzen, abschleifen, behauen; H.cortar, tallar; I.tagliare; P.talhar, recortar.
- tajp/i.** Skribi per maŝino.—A.to type, to typewrite; F.taper (à la machine), dactylographier; G.tippen, maschineschreiben; H.mecanografiar, escribir con máquina; I.dattilografare, scrivere a macchina, battere a macchina; P.dactilografar.
- televid/i.** Vidi per televizio.—A.to watch television, F.voir à la télévision, G.das Fernsehen schauen, H.mirar a la television, I.vedere alla televisione, P.assistir televisão.
- tempest/o.** Ventabunda vetero, pli forta ol ŝtormo, sed malpli forta ol uragano.—A.tempest; F.tempête; G.Sturm, stürmisches Wetter, Unwetter, Ungewitter; H.tempestad; I.tempesta; P.tempestade.
- tener/a.** Montranta varman delikatecon de la koro.—A.tender; F.tendre, caessant; G.liebevoll, herzlich, liebkosend, zärtlich; H.tierno, cariñoso; I.tenero. affettuoso, amorevole; P.terno, carinhoso, amoroso, afável.
- teren/o.** Terspaco, rigardata el la vidpunkto de ĝia utiligado por difinita homa aktiveco.—A.ground, piece of land, terrain; F.terrain; G.Boden. Grundstück, Gelände; H.terreno, solar; I.terreno; P.terreno.

- tig/o.** Tiu parto de herbecaj plantoj, kiu portas burĝonojn, foliojn kaj florojn, kaj kiu kune kun la radiko konsistigas la akson de la planto.—A.stem, stalk (of plant); F.tige, queue (fleur), pied (herbe); G.Stiel, Stengel; H.tallo; I.gambo, culmo; P.talo, haste, caule.
- tonel/o.** Unuo de volumeno, uzata por mezuri la internan kapaciton de ŝipo: *la internacia ~o valoras 2,83m³*.—A.ton (displacement); F.tonneau (de jauge); G.Tonneau, Tonne; H.tonel, tonelada; I.tonnellata; P.tonelada (mar.). Kp. tuno.
- trajn/o.** 1. Sinsekvo de similaj veturiloj aŭ objektoj trenataj, aŭ (se figure) vice irantaj unu post la alia: *ŝipo~o, fos~o; (f) ondo~o*. 2/Vagonaro movata de lokomotivo kaj iranta laŭ difinita horaro (= *vagon~o*). 3/Veturilaro, kiu transportas ĉion, kion la trupoj bezonas por vivi kaj batali (= proviza veturilaro, militista konvojo, loĝistika servo).—A.1/2/3 train; F.1/2/3/train; G.1/2/Zug. 3/Train, Tross; H.1/2/3/tren; I.1/2/treno, 3/carreggio, convoglio; P.1/2/3/ trem.
- traktor/o.** Potenca motorveturilo uzata por tiri agrajn maŝinojn aŭ ŝarĝveturilojn.—A.tractor; F.tracteur; G.Traktor, Zugmaschine, Schlepper; H.tractor. I.trattore, P.tractor.
- trejn/i.** Submeti al instruado kaj ekzercado, por konduki ĝis la dezirata stato de kapableco aŭ por prepari al sporto, batalado ktp.....—A.to train; F.former (un disciple), instruire (conscrits), préparer (candidat), exercer (oreille), entraîner (sportif); G.trainieren, ausbilden; H.adiestrar, entrenar, ejercitar: I.allenare; P.treinar, adestrar, exercitar (par esporte, batalha, trabalho).
- tun/o.** Mezurunuo de pezo valoranta 1 000 kilogramojn—A.metric ton, tonne, F.tonne. G.Tonne, H.tonelada, I.tonnellata, P.tonelada (métrica).— Kp. tonelo.
- vakcin/o.** Substanco donanta imunecon kontraŭ mikroba aŭ parazita malsano.—A.vaccine, F.vaccin, G.Impfstoff, Vakzine, H.vacuna, I.vaccino, P.vacina.
- vegetal/o.** Ĉiu membro de unu el la du regnoj de vivuloj, karakterizita per ĉelparietoj el celulozo, havanta la funkciojn de sinnutrado kaj reprodukto, kaj plej ofte posedanta klorofilon.—A.plant (as opposed to animal); F.un végétal; G.Pflanze, Gewächs; H.un vegetal; I.un vegetale, pianta; P.vegetal.
- vertic/o.** Sekcopunkto de la du lateroj de angulo, ankaŭ se la angulo apartenas al plurlatero aŭ al pluredro.—A.vertex, apex (of an angle); F.sommet (d'un angle); G.Scheitelpunkt (eines Winkels), Ecke (eines Dreiecks); H.vértice (geom.); I.vertice (geom.); P.vértice (geom.).
- viper/o.** Zamenhofa formo de: vipuro (genro de serpentoj: Vipera).—A.viper, F.vipère, G.Viper, H.víbora, I.vipera, P.víbora.
- vit/o.** Vinberplanto (Vitis ampelos, Vitis vinifera).—A.vine, F.vigne (plante), G.Weinstock, H.vid, viña, I.vite, P.videira.

BAZA RADIKARO OFICIALA

ENKONDUKO

I. CELOJ KAJ PRINCIPOJ

En “Lingvo — Stilo — Formo” (1931, p. 51-52) K. KALOCSAY skribas:

“Devas ekzisti limita vortprovizo, la *trunko* de la lingvo. Ĉiu, kiu volas uzi la lingvon nur por ĉiutagaj bezonoj, devas koni ĉi tiun lingvo-trunkon, sed ne bezonas nepre koni pli multe. Ĉiu, kiu volas esti certa pri tio, ke oni lin komprenos, devas uzi nur ĉi tiun trunkan vortprovizon, alie li riskas miskomprenon. Sekve, ĉiuj lernolibroj devas enhavi ĉi tiun vortprovizon, sed nenion pli.

“Kaj ĉi tiu principo tute ne estas speciale kaj ekskluzive Esperanta; tute la saman ni trovas ankaŭ en la lerno de la naciaj lingvoj. Ja en ĉiu natura lingvo oni povas distingi ĉi tiun vulgaran vortprovizon, konsistantan el la ĉiutage uzataj vortoj. Ĝin enhavas la bonaj lernolibroj; post ĝia funda ellerno, oni jam povas kompreni kaj sin komprenigi, eĉ flue interparoli kaj korespondi pri ordinaraj temoj. Kaj se iu per sia gepatra lingvo parolas al fremdulo, li ja instinkte parolas “pli simple”, t.e. li uzas nur ĉi tiun vortprovizon. Sed certe neniu pretendas, sciante sole ĝin, kompreni senmanke la literaturajn ĉefverkojn de la respektiva lingvo; ĉiu, tute kompreneble, konsultas por tio bonan vortaron, kaj tiel, dum lego, iom post iom li kompletigas sian lingvokonon.”

Plie, KALOCSAY substrekas, ke la Akademio “jam komencis fari distingon inter la literatura kaj vulgara vortprovizo: en la lasta eldono de la Oficiala Vortaro, la unuan ĝi presigis per kursivaj literoj”. Plie, li opinias, ke estus tre necese “eldoni la zorge konsideritan *vulgaran*, aŭ *lernolibran vortprovizon* en tute aparta broŝuro: per tio la vortaro de la lernolibroj fariĝus tute unueca, kaj ĉiu povus certe scii, kian vortkonon oni povas supozi pri iu, kiu ĉerpis sian konon sole el lernolibro, kaj kiun oni nomus “elementa esperantisto”.”

Ni memorigu ĉi tie, ke GROSJEAN-MAUPIN, nia fama leksikologo, jam en 1910 esprimis similajn ideojn en la Antaŭparolo al sia Esperanta-Franca Vortaro: la koncerna parto estas legebla en Esperanto sur la paĝoj de “La Revuo” (Vol. 5; p.227-236).

Tiujn ideojn la Akademio, sekvante sian Sekcion pri la Ĝenerala Vortaro, faris siaj; ĝi opiniis, ke nun estas tempo ellabori tian trunkon aŭ bazan vortprovizon, sub formo de la nuna Baza Radikaro Oficiala (B.R.O.). Kune kun aliaj studobjektoj, la Akademio prilaboris tiun Radikaron ekde 1966, dum la Sekcio preparis la terenon jam unu jaron pli frue, surbaze de laboro, kiun ĝia direktoro entreprenis ĉirkaŭ la jaro 1960 kaj finis en 1965.

Tiu Baza Radikaro Oficiala rezultas el komparo de pli fruaj ofteco-listoj starigitaj laŭ tre malsamaj kriterioj kaj prezentiĝas sub formo de *naŭ grupoj*; la unua grupo konsistas el la plej oftaj elementoj, t.e. pli ĝuste kaj principe el tiuj elementoj, kiuj aperas en plej multaj ofteco-listoj; en la naŭa grupo troviĝas elementoj, ĉefe radikoj, kiuj aperas en nur unu el la ofteco-listoj. Alia karakterizo de tiu Baza Radikaro Oficiala estas, ke ĉiu radiko, kaj se eble ĉiu elemento, estas klasita laŭ sia signifokategorio substantiva, verba aŭ adjektiva; tiel la Baza Radikaro Oficiala aperas kiel praktika komplemento al la “Konstatoj pri la Vortfarado”, kiun ni publikigis en la antaŭaj “Aktoj”. Tiu radikaro estas la unua oficiala verko, kiu speciale kaj aparte prizorgas la signifokategoriojn. Por la fiksado de tiuj kategorioj estis tre atentata la libreto de Eugen WÜSTER “La Oficiala Radikaro kun enkonduko kaj notoj” (1923. XVI + 70 paĝoj), kvankam la Akademio ne povis sekvi ĉiujn proponojn de tiu aŭtoro. Oni cetere atentis, ke malgraŭ sia titolo tiu valora verko estis tute privata. Fine, ni ĉi tie menciis, ke por plene starigi la Bazan Radikaron Oficialan, kaj pli precize ties grupojn 7, 8 kaj 9, la Akademio devis samtempe oficialigi tutan vicon da vortoj, kiuj sekve formas parton de nova aldono al la Universala Vortaro: la 8-a Oficiala Aldono.

Oni do konstatu, ke tia laboro havis kaj pedagogiajn kaj teoriajn celojn. Sur teoria plano la Akademio devis plenumi tutan serion da laboroj, kiuj atendis jam de jaroj; sed anstataŭ plene decidi absolute kaj senrevene pri ĉiu problemo—kio postulus nelimigeblan tempon—ĝi pli pragmatisme studis la prezentiĝantajn problemojn ĉe la nivelo de tiu Baza Radikaro. Pri la pedagogia flanko, oni pensu pri ĝia gravo por lingvo, kiu en la nuna mondo estas preskaŭ nenio kaj volas fariĝi la dua lingvo por ĉiu; oni pensu ankaŭ, ke, se ĉiu ajn povas kompili ofteco-liston, nur la Akademio povas esperi, ke ĝia propono renkontos vastan aprobon kaj estos konsiderata de ĉiuj kiel valida.

Tamen al la demando, ĉu tiu Baza Radikaro Oficiala estu severe atentata en la lernolibroj, kiuj ja tre diversas laŭ la pedagogiaj celoj de ĉiu aŭtoro, ni nuance respondos jenon:

a) Verkanto de inica lernolibro povos enpreni, *se li tion deziras*, la enhavon de ekzemple la kvar unuaj Grupoj; sed alia preferos enpreni 5 aŭ 6 aŭ nur 3;

b) La grupo 9 de malpli oftaj radikoj, pli ol la aliaj, rezultas el konsideroj pri “disponebleco” kaj el apliko de la metodo de “interesocentroj”; sekve estos tute normale, ke ĉefe el ĝi oni ĉerpu pliajn radikojn por kompletigi la vortprovizon de difinita lernolibro. Sed kompreneble ĉiu aŭtoro restos libera, sub propra respondeco, elekti diversajn radikojn ankaŭ ekster B.R.O. Sed estas rekomendite esti treege ŝparema en tiaj aldonoj.

c) La tutan radikaron ni konsideras antaŭ ĉio *kiel helpilon, sed ne kiel leĝon strikte observendan*: en vivanta lingvo, kia estas Esperanto, alia konduto estus absurda. Oni pli-malpli, laŭ propra respondeco, instruu ĝian enhavon: oni des pli severe atentu tiun enhavon, ju pli oni proksimiĝas al la “Grupo 1” de la pli oftaj elementoj.

Leviĝis aliaj demandoj, al kiuj konvenas doni jenajn respondojn:

1. La grupigo “laŭ ofteco” en naŭ grupoj ne estas la esenca flanko de tiu ĉi radikaro. Ĝia esenca tasko estas antaŭ ĉio konfirmi la bazan leksikan konsiston de la ordinara (nefaka) Internacia Lingvo en la nuna tempo. Ĝuste pro tio ni ne ligis nin nepre al la deduktoj de la ĝisnunaj unuopaj esploroj kaj ne absolute serĉis la “oftecon”, sed ni korektis tiujn deduktojn, kiel ni jam aludis, per konsideroj pri “disponebleco” kaj per apliko de la metodo de interesocentroj. Esence estas establi la *proksimuman trunkon* de la lingvo kaj okaze de tiu establado konfirmi la kategoriecon de la unuopaj radikoj.

Eblus prezenti la tuton en ununura alfabetorda listo pro la principa relativeco de la ofteco (ĉu *patro, infano*, klasitaj inter la pli oftaj, iam estos uzataj, ni diru, de la fraŭla filatelisto?).

La supereco de B.R.O. konsistas en tio, ke ĝi rezultas el komparo de diversaj listoj *elfaritaj laŭ tre malsamaj kriterioj*: por aperi en la unuaj grupoj, radiko devas esti deklarita “ofta” laŭ tre malsamaj kriterioj; sed tamen ... eĉ oftan radikon oni povas preteratenti.

Aliflanke, eblus imagi listojn multe pli bone elfaritajn ol B.R.O.—kun eventuala helpo de komputoroj, kio estus por la Akademio tro kosta entrepreno —, aŭ faritajn laŭ tre preciza celo: lingvo de infanoj, de studentoj, de kongresanoj, de virinoj . . .

2. Kio estu la rilato inter la Baza Radikaro Oficiala kaj la Universala Vortaro kaj ĝiaj Aldonoj? Leviĝis voĉoj, ke, post apero de B.R.O., ne plu estu parolo pri la ĝisnunaj oficialaj dokumentoj.

Tamen la du serioj de dokumentoj havas malsaman funkcion. La nova estas simple ordiga kaj kompletiga rilate al oficialeco de la radikoj uzataj en la “trunko de la lingvo”. Ni opinias, ke oni devas zorge diferencigi tiujn du funkciojn.

3. Ĉu la nomo *Baza Radikaro Oficiala* estas ĝusta? Efektive, krom radikoj ĝi entenas aliajn elementojn (gramatikajn finaĵojn kaj helpvortojn) kaj eĉ kelkajn radikalojn (*kalkanumo* ...). La plej ĝusta nomo sendube estus “Baza morfemaro”. Sed temas pri pure “kondiĉa” titolo, kiu havas la avantaĝon esti simpla kaj komprenebla de ĉiuj, kaj cetere la radikoj ja estas la granda plimulto dum oni scias, ke tre multaj aliaj elementoj (ekz-e ĉiuj afiksoj) estas asimileblaj al radikoj.

II. STARIGO-PROCEDO DE LA BAZA RADIKARO OFICIALA

A/KOMPILADO DE EKZISTANTAJ LISTOJ

a) S. RUBLEV. “Provo de kvanta element-analizo en la lingvo Esperanto” (“Senn.Rev.”, 1927, n°10/12, p.155-163. — Tiu kajero aperis ankaŭ kiel broŝuro: “Kvardek jaroj”).

Sur paĝo 163 aperas ofteca listo, bazita sur esploro de 100 000 tekstvortoj. Temas pri listo de 259 elementoj klasitaj en kvar grupoj: radikaj elementoj “absolute oftaj” (91, el kiuj 8 “internaciaj”); radikaj elementoj “oftaj sed malpli valoraj” (58, el kiuj 5 “internaciaj”); “helpaj” elementoj “absolute oftaj” (88: gramatikiloj kaj afiksoj); “helpaj” elementoj “oftaj sed malpli valoraj” (22).

La plej multaj “help-elementoj” de RUBLEV troviĝis en nia primitiva Grupo 1 de plej oftaj elementoj, sed ankaŭ en Grupoj 2, 3, 4 kaj eĉ 8 (-ismo). La aliaj elementoj troviĝis en la primitiva Grupo 1, sed ĉefe en Grupo 2, kaj ankaŭ en 3, 4, 5. Ni eĉ trovis en Grupo 7: *burgō*, en Grupo 8: *ekonomio* kaj en Grupo 9 (la grupo de elementoj aperantaj en nur unu listo): *proleto*. — Kaj tiuj rimarkoj lumiĝas, se ni konstatas, ke estis analizitaj tri numeroj de “Sennaciulo” kaj tri libroj: “ABC de Sennaciismo”, “Patroj kaj Filoj” de Turgenev kaj “En malliberejo” de Ĉirikov...

Se ankoraŭ necesus, tio demonstras, ke *la vortofteco estas nocio tre relativa: ĝi dependas de la analizitaj dokumentoj*. Kaj tio pravigas nian komparadon de listoj faritaj laŭ malsamaj kriterioj kaj el malsamaj materialoj: la diversaj listoj reciproke korektas kaj kompletigas unu la alian. Absoluta listo estus farebla nur surbaze de la komputado de nia *tuta* literaturo (beletra, teknika...) aŭ almenaŭ surbaze de treege vasta eltiraĵo de ĝi.

b) Leo BLAAS. “Statistiko de 50 000 tekstvortoj” (“Esperantologio”, I., p.107-132 kaj 160-200).

Ĝi donas liston de 743 elementoj ordigitaj laŭ ofteco indikita en po-miloj kaj alian liston alfabetan kun la diversaj kunmetaĵoj. La aŭtoro juĝis sian laboron tre modeste: “pli teoria ol praktika: la bazo (50 000 tekstvortoj) estas tro malvasta”. Sed la analizitaj tekstoj estas multe pli diversaj ol en la laboro de RUBLEV: temas pri po unu paĝo hazarde elprenita el ĉiu paĝocento de pli ol 110 verkoj elektitaj sen prefero. Tia sistemo maksimume ebligas elimini la tro fakajn vortojn, kaj rapida tralego de la titollisto donas la impreson, ke nia literaturo estas sufiĉe bone reprezentita. Ĝi ankaŭ pravigas, ke la rezulta listo entenu pli ol la duoblo de la RUBLEV-listo, kiu analizis duoblan tekstokvanton, sed nur en ses dokumentoj.

c) d) e) V. SETĀLĀ:

ĉ) Maaïman Kirjeenvaihdon Opas. 1947. 16 p. (la 500 elementoj de “Mary kaj Sulo”).

d) Privilegia Vojo. Lernolibro kun listo de 1 260 elementoj.

e) Listo de 1750 elementoj komunikita de la aŭtoro; kvin grupoj: la 1-a (204 elem.) kun ĉefe “help-elementoj”; la aliaj kun resp. 146, 200, 450 kaj 750 elementoj.

Tiuj tri listoj de nia Kolego SETĀLĀ estas starigitaj laŭ tute originala procedo, kies klarigon oni legu en “Esperantologio”, I., p. 5-32.

f) Prof. BOVET kaj Henriette ITH. Listo aperinta i.a. en “Esperanto”, 1956, p.173. Ĝi estas starigita laŭ principoj aluditaj en “Enketo pri Internacia Helplingvo” de P. BOVET (eld. Sveda Esperanto-Federacio: vd. p.4-8).

Tiu listo donas 577 radikojn, sed neniun help-elementon: ni kalkulis kun tiu fakto okaze de la starigo de la B.R.O.-listo. Tiuj radikoj rezultas el komparo de vortoftecaj listoj nacilingvaj kaj Esperantaj. Pri la preparlaboroj oni legu en “Int. Pedagogia Rev.”, AUG 28, p. 1-15. La definitiva laboro komparas jenajn listojn: du franclingvajn (HEMNON, bazita sur 400 000 tekstvortoj; G.E. VAN DER BEKE, bazita sur 1 147 748 tekstvortoj), unu anglalingvan (E.L. THORNDIKE, 1 668 000 tekstvortoj), unu germanan (F. W. KAEDING, 10 906 235 tekstvortoj) kaj unu hispanan (M. A. BUCHANAN, 1 200 000 tekstvortoj); plie, liston el infanlingvaĵo (D-ro D. A. PRESCOTT,

77 403 tekstvortoj responditaj de infanoj); fine, du Esperantajn listojn (RUBLEV: vd. supre!) kaj novan laboron de la aŭtoroj mem, kiuj analizis naŭ Esperanto-verkojn: ses originalaĵojn kaj tri tradukojn el pola, kataluna kaj ĉina lingvoj.

La rezulto estas listo de 577 radikoj dividitaj al 8 grupoj (kun resp. 26, 107, 67, 48, 58, 69, 78 kaj 124 radikoj); la unua grupo entenas la radikojn aperantajn en ĉiuj listoj, la lasta tiujn en nur unu.

La radikoj de tiu listo troviĝas en la unuaj grupoj de la B.R.O.-listo: en niaj Grupoj 1, 2, 3 kaj 4; tamen kelkaj troveblas en Grupo 7 (*arĉeo, banko, ĉia, gracia, leono, malgraŭ, metro, pala, pastro, rajdi, sceno, temo*), en Grupo 8 (*imperio, nenies, neniom*) aŭ eĉ en Grupo 9 (*kazo, racio*): tiuj du lastaj radikoj troviĝas do nur en tiu listo BOVET-ITH: kaj tio ree montras, ke ĉiu kaj ĉia listo estas de valoro “tre relativa”.

g) *Le français fondamental—Unua grado*. Ellaborita ĉirkaŭ 1954 de komisiono (en kiu estis nia Prezidanto, Prof. Waringhien) sub la direktado de Prof. GOUGENHEIM kaj SAUVAGEOT. Vidu: G. WARINGHIEN: “Ĉu vortstatistiko sufiĉas por la starigo de bazvortaro?” (en: “Sciencaj studoj”, 1958, p.27-30).

Temas pri analizo de 312 000 tekstvortoj, sed por la unua fojo la bazo ne estis literatura aŭ presita lingvo, sed la *parolata lingvo*, dank’ al magnetofonaj registraĵoj (tamen antaŭvenis la infanlisto de PRESCOTT, vd. supre). Tio kondukis al listo de 800 oftaj vortoj, el kiuj oni unue eliminis centon (duoblaĵoj, vulgaraĵoj, malfacilaĵoj) kaj al kiuj oni aldonis 700 elektitajn per nova metodo, nomata “metodo de disponebleco”. La aŭtoroj asertas: “*la ofteco respondas al la aŭtomataĵoj de la parolo, la disponebleco estas ligita al la intereso, kiun prezentas por ni la nocioj esprimataj de la vortoj.*” La oftecaj listoj donas ĉefe ĝeneralajn vortojn, la disponebleco donas konkretajn vortojn. Tiuj disponeblaj vortoj estis elektitaj per la metodo de “interesocentroj”, bone konata de la pedagogoj; enketo en lernejoj petis de la lernantoj liston de 20 vortoj, ekz-e pri meblaro: oni donu la nomojn de la mebloj, kiuj ŝajnas plej utilaj. Oni tiel enketis pri 16 interesocentroj.

La suma rezulto estis listo de 1 455 vortoj (el kiuj 269 gramatikaj). Ni tradukis ĝin al Esperanto, zorgante doni, el eventualaj pluraj signifoj, nur la plej evidentan.^E

h) *Le français fondamental — Dua grado*. Listo, kiu aldoniĝas al la antaŭa. Ĝi estis ellaborita el tri kategorioj de dokumentoj: 1/La magnetofone registritaj tekstoj (enpreno de vortoj kun malpli granda ofteco kaj ankoraŭ ne enprenitaj en la unuan gradon). — 2/La libro de C. E. VAN DER BEKE (citita supre! Skriba lingvo el literaturo kaj ĵurnaloj). — 3/Novaj enketoj: analizo de 425 “unuoj” el 500 tekstvortoj; la “unuoj” rilatas al tekstoj el revuoj kaj ĵurnaloj sub jenaj rubrikaj: politiko, socia vivo, transportoj, profesia vivo, scienco, beletro, ekonomio, sportoj, ktp. Temas do pri vastigo de la nocio pri “disponebleco”.

Ni same tradukis al Esperanto la rezultantan liston el 1 800 vortoj (laboro konfesinde jam pli subjektiva ol por la “unua grado”!). Kiel por la antaŭa listo g) ni kolektis la radikojn de la ricevitaj Esperantaj vortoj. Notinde, ke por nia fina kalkulo, ni konsideris, ke ĉiu radiko el la “unua grado” aŭtomate apartenas ankaŭ al la “dua grado”, konforme al la intenco de la aŭtoroj.

i) *Help-elementoj*. Ni mem starigis liston de help-elementoj per komparo de tiuj el la priparolitaj listoj, kiuj traktis ilin: ja aparte gravaj, ili ne estas rekte atentitaj de listoj g) kaj h), tute ne de listo f); nur la listoj de RUBLEV kaj de SETÄLÄ prizorgas ilin aparte. Ni do zorgis meti la oftajn el tiuj help-elementoj en nian Grupon 1 de plej oftaj elementoj; por tio nin tre helpis la listo de BLAAS, kiu dank’ al indiko de la po-miloj ebligis al ni korekti la definitivan liston. Efektive la Akademio decidis rekunigi en Grupon 1 eĉ 25 help-elementojn ĝis tiam dissematajn en la diversaj grupoj, dum tio ne estas pravigita de iliaj po-miloj ĉe BLAAS (*almenaŭ, ambaŭ, apenaŭ, kvazaŭ, preskaŭ; ĉia, nenia, nenie, tiom; ĉef-, do, dum, ekster, ha! ho!, -ismo, ja, je, jen, ĵus, krom, nek, nu, preter, super*). Kompense, ni ne tuŝis 8 help-elementojn, kiuj aperas precipe en la Grupo 9, sed tute ne ĉe

E. La lasta vorto, “evidentan”, kaj la fina punkto mankas en la originaj versioj de Aktoj II. La enmetita vorto estas konjekto proponita de d-ro A.Albault por tiu ĉi eldono.

BLAAS (-aĉa, eks-, -enda, fi-, mis-, pra- kaj ankaŭ des kaj ju, resp. el Grupoj 7 kaj 8). Plie ni reĵetis el Grupo 1 al Grupo 9 -ingo kaj -ero el la sama motivo. Per tio ni jam parolis pri unu aparta punkto de la ĉapitro pri modifadoj: ni ne revenos al ĝi.

B/KOMPUTADO

Tiam por ricevi la primitivan liston de la Baza Radikaro Oficiala sufiĉis nombri por ĉiu elemento, en kiom da listoj ĝi aperas: la elementoj, kiuj aperis en ĉiuj listoj estis alkalkulitaj al la Grupo 1, ili estas la plej oftaj; en la Grupon 2 envenis tiuj elementoj, kiuj troviĝis en ĉiuj listoj minus unu; kaj tiel sinsekve ĝis la Grupo 9, kiu entenas la elementojn troveblajn en nur unu listo.

C/LA PRIMITIVA REZULTO

La rezulto de tiu pli-malpli mekanika laboro estis listo de 2 537 elementoj dividitaj jene:

Grupo 1: 170	Grupo 4: 158	Grupo 7: 298
Grupo 2: 89	Grupo 5: 159	Grupo 8: 496
Grupo 3: 127	Grupo 6: 223	Grupo 9: 814

Tiun liston la Akademio ne povis konsideri definitiva: ni klarigos la entreprenitajn modifojn, ĉi-sube en III.

D/ELEKTRONIKAJ KOMPUTADOJ

En “Interlingvistika Informa Servo” de Septembro 65, aperis propono de D-ro Klaus SCHLÜTER analizi tekstojn per elektronikaj kalkul-aŭtomatoj (‘komputoroj’). D-ro SCHLÜTER respondis al ni, ke li estus preta fari la laboron “tute sen kostoj por vi, ĉar je plena pago la kostoj certe estus tro altaj por via buĝeto. La plej multekosta partlaboro estus la kopiado de la (disponigita) teksto sur trukartoj”. Li mem kopius ĝin kaj pro tio li petas, “ke la koncerna teksto ne estu tro longa, eble ne pli ol 5 000 ĝis 10 000 vortoj”.

Se vi legis la antaŭan priskribon, tuj alsaltas al vi la certeco, ke la propono havas nenian intereson por ni: RUBLEV esploris tekston de 100 000 vortoj, BLAAS de 50 000. Komputoro estus interesa por ni, se per ĝi ni povus esplori almenaŭ 1 000 000 da tekstvortoj kiel VAN DER BEKE, THORNDIKE aŭ BUCHANAN, aŭ se eble 10 000 000 kiel KAEDING. Teorie tio estas farebla: sufiĉas pagi; plie ni memoru, ke la maŝinoj faras nur parton de la laboro.

E/ POSTAJ LABOROJ

Dum la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro estis finanta siajn preparlaborojn, aperis en “Esperanto”, DEC 65, p.211, nova listo de 600 radikoj plus 109 “gramatikaĵoj”. Al tiu listo la redaktoro iniciatis aldonon de 40 pliaj elementoj, kiujn li opiniis necesaj en kursoj por infanoj. La aŭtoro estis E. LINNUSE el Tallin; la redaktoro — nia nuna Kolego D-ro SADLER.

Nu, tiu listo estis farita per modifo de la listo de Leo BLAAS: preskaŭ ĉiuj ĝiaj elementoj troviĝas en nia listo, sed dissemnitaj en la diversaj grupoj. Ĝi aldonas 20 elementojn, kiujn ni aldonis post kribrado en nian Grupon 9.

Pli poste aperis diversmaniere tre diversaj listoj, ĉu originalaj, ĉu kiel modifoj de pli fruaj. Certe aperos ankoraŭ multaj aliaj.

III. MODIFADO DE LA PRIMITIVA LISTO

Pro la rimarkigoj de diversaj Kolegoj, la Akademio decidis homogenige transklasigi kelkajn elementojn: ni jam citis la “help-elementojn”; ni aldonu, ke kelkaj izolaj radikoj de Grupo 1 estis ŝovitaj al Grupo 2, kaj ke ekzemple la tagnomoj unuflanke, la monatnomoj aliflanke estis rekunigitaj en po unu sama grupo.

Sed la ĉefaj modifoj de la primitiva listo estis entreprenitaj de la Sekcio mem kaj koncernis la universalecon de la radikoj aŭ la eliminadon de diversaj radikoj.

A) UNIVERSALECO DE LA RADIKOJ

La Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro opiniis, ke la liston eniris iom da subjektiveco, ĝuste pro la maniero, kiel estis kolektita la baza materialo de la originaj ofteco-listoj aŭ ankaŭ pro la tradukado de la francaj listoj. Fakte eniris la primitivan liston de B.R.O. kelkaj radikoj “tro eŭropaj” (eble “tro francaj” aŭ “tro skandinaviaj”), ekzemple koncerne al zoologio, botaniko, religio kaj geografio aŭ administracio. Ŝajnis al la Sekcio kaj al la Akademio, ke la definitiva listo devus esti pli “universala”, kaj ĝi opiniis, ke tiu universaleco estus atingebla per ioma modifo de la koncernaj vortprovizoj pri zoologio, botaniko ktp. Du kontraŭaj procedoj de modifado sin prezentis: nome, aŭ a) interŝanĝi iujn radikojn de difinita vortprovizo per aliaj, tiel ke la diversaj partoj de la mondo estu pli bone reprezentitaj, aŭ b) tute aŭ parte forigi difinitan vortprovizon.

Tia modifado estas legitima, ĉar fakte la listo de B.R.O. konsistas parte el “oftaj elementoj”, parte el “disponeblaj elementoj”. Ĉio okazos do, kvazaŭ ni modifus nur la elekton de la disponeblaj radikoj.

Ni atentigu pri aparta punkto: i.a. pro la francaj listoj eniris kelkaj radikoj ĝis nun ne tre uzataj en E-o. Tio respegulas ankaŭ la malpli grandan uzatecon de Esperanto, kaj ĉar ni volas, ke ĝi estu pli kaj pli uzata, estas logike, ke ni enprenu ilin. Preter la simpla konstato pri la stato de la lingvo, ni devas deziri prepari ĝian estontecon.

La Sekcio konsideris do la ĉi-subajn vortprovizojn eltiritajn el la primitiva formo de B.R.O. kaj alprenis diversajn modifo-decidojn, kiujn ni indikas: en tio ĝi estis bonŝanca ricevi kunlaboron de Prof. NEERGAARD, plantpatologo, kaj de S-ro NAKAMURA, kiu raportis ĉi-rilatan pridiskuton en la Japana Esperanto-Instituto; ankaŭ de aliaj Kolegoj, kiel BUTLER, ROSBACH, SONNENFELD kaj tute aparte ROSETTI, kiu atentigis pri kelkaj bestonomoj “bone konataj pro *figura uzo* en nia kulturo” aŭ rigardataj kiel tipoj de ĝeneralaj kvalitoj.

Resume, jen la vortprovizoj eltiritaj el la primitiva listo kaj jen por ĉiu el ili la alprenitaj decidoj:

a) *Zoologio* (45 radikoj): abelo, aglo, alaŭdo, anaso, ansero, araneo, azeno, bovo, ĉevalo, elefanto, ezoko, formiko, hirundo, hundo, insekto, kamelo, kankro, kapro, kato, koko, kolombo, korvo, kukolo, kulo, kuniklo, leono, leporo, lupo, moskito, muso, muŝo, papilio, perko, pigo, porko, rato, raŭpo, sciuro, serpento, simio, ŝafo, urso, vanelo, vermo, vulpo.

Estis decidite forstreki 3 radikojn:

kulo (speco de moskito inter multaj aliaj), *perko*, *vanelo*.

kaj aldoni jenajn 28:

akrido, *angilo*, *apro*, *cervo*, *cigno*, *cikado*, *cikonio*, *gobio*, *haringo*, *karpo*, *korniko*, *krokodilo*, *lacerto*, *larvo*, *limako*, *najtingalo*, *papago*, *pasero*, *pavo*, *rano*, *skorpio*, *strigo*, *struto*, *ŝakalo*, *testudo*, *tigro*, *vespo*, *vulturo*.

Nova suma nombro: 70.

b) *Botaniko* (55 radikoj): abio, acero, ajlo, anemono, aveno, bakterio, banano, beto, betulo, brasiko, bulbo, citrono, ĉerizo, fazeolo, frago, frambo, fungo, kafo, karoto, konvalo, kverko, lilio, maizo, marono, musko, oranĝo, paduso, palmo, persiko, piceo, pino, pipro, piro, pizo, platano, pomo, terpomo, pruno, ribo, rizo, rozo, rubuso, saliko, sekalo, sorpo, tabako, teo, tomato, tremolo, tritiko, tusilago, uvo, vakcinio, violo, vito.

Estis decidite forstreki 9 radikojn:

acero, *anemono*, *marono*, *paduso*, *rubuso*, *sorpo*, *tremolo*, *tusilago*, *vakcinio*.

kaj aldoni 23 jenajn:

abrikoto, *algo*, *bacilo*, *bambuo*, *cepo*, *daktilo*, *dianto*, *fabo*, *figo*, *hordeo*, *kakao*, *kakto*, *kaŝtano*, *kokoso*, *kukumo*, *kukurbo*, *lapo*, *lotuso*, *melono*, *mirtelo*, *rafano*, *sorgo*, *spinaco*.

Nova suma nombro: 69.

c) *Religio* (25 radikoj): abato, anĝelo, bapti, beni, Budho, demono, diablo, episkopo, infero, Islamo, Izraelo (virnomo), katedralo, katoliko, kirko, Kristo, Mahometo, monaĥo, Moseo, moskeo, paradizo, paroĥo, pastoro, protestanto, rabeno, templo.

Estis proponite forstreki la tutan liston, ĉar efektive ne eblas esti universala sur tiu tereno, se oni samtempe volas liston ne tro ampleksan, sed post pripenso estis decidite reteni en la listo jenajn vortojn, kiuj estas uzataj pli vaste, ol en la strikte religia senco: *anĝelo, diablo, bapti, beni, infero, paradizo*. (6 radikoj).

d) *Geografio (kaj similaĵoj)* (17 + 7 radikoj): Anglo, Brito, Dano, Eŭropo, Finno, Franco, Germano, Hispano, Hungaro, Italo, Latino, Nederlando, Norvego, Polo, Ruso, Svedo, Sviso — judo, negro — centimo, colo, franko, prefekto, departemento.

Estis decidite anstataŭigi tiun liston per nova jena: *Afriko, Ameriko, Aŭstralio, Azio, Eŭropo; Atlantiko, Pacifiko, Mediteraneo* (8 radikoj).

e) *Malnovaj konceptoj*. Estis decidite forstreki la tri radikojn: *aeroplano, fiakro kaj kaleŝo*. La du lastaj respondas al eksmodaj veturiloj. La unuan oni delonge prefere esprimas per *aviadilo*, aŭ eĉ nun per ĝia radiko *avio*: ĉiuokaze *aviado* enestas en B.R.O.

f) *Listo de LINNUSE* (Vd. II, E) El la 20 aldonaj elementoj de la LINNUSE-SADLER-listo, estis decidite aldoni:

—el la ĉefa parto de tiu listo: 7 radikojn: *himno, ĥoro, kosmo, muzeo, pioniro, proponi, starti*;

—el la gramatikiloj, 6 elementojn: *-aĉa, -ĉj-, eks-, fi-, -nj-, pra-*;

—el la aldona parto, 1 radikon: *uniformo*;

Cetere jam estas notitaj el ĝi 3 bestonomoj (Vd. III, A, a): *cigno, cikonio, krokodilo*. Estis ankaŭ decidite ne enpreni du radikojn, kiuj apartenus al vortprovizo d), nome: *kolĥozo kaj soveto*, kaj unu alian (*buso*), kiu estas mallongigo de *aŭtobuso*.

Ĝenerala rimarkigo: la nove enprenitaj elementoj estas alkalkulitaj al la Grupo 9 de malpli oftaj elementoj.

B) ELIMINADO DE DIVERSAJ RADIKOJ

Okaze de plej diversflanka diskutado, la Sekcio decidis elimini diversajn radikojn, ĉefe pro tio, ke ilia uzateco ne ŝajnas sufiĉe ĝenerala, por ke ili povu eniri en la B.R.O. Ja pro tradukoj ili aperis en la primitivaj listoj kaj kompreneble ilia eliminado signifas nenion pri ilia taŭgeco aŭ netaŭgeco.

Jen kelkaj ekzemploj de eliminitaj radikoj: *adolto, agro, artiklo, avio, brumo, ekskuzi, elektrofono, fornelo, fragila, frekventi, frida, graŭli, kultivi, magra, marmito, mungi, reglamento, trivi, uzino...*

Por aliaj ni elektis unu el du formoj: *ekz-e: tempesto kaj ŝtormo, plaĝo kaj strando ...* Kvankam ne estas certe, ke ne ekzistas senconuancoj inter tiuj formoj.

IV. ALIAJ LABOROJ faritaj de la Akademio okaze de la starigo de B.R.O.

A. KATEGORIECO DE LA RADIKOJ

Oni scias, ke la Akademio paralele studis la vortfaradon kaj establis tekston de “Konstatoj” (“Aktoj de la Akademio” 1963-67). Tiuj konstatoj agnoskas, ke la Universala Vortaro kaj ties Oficialaj Aldonoj ne estis redaktitaj kun la celo fiksi la signifokategoriojn de la radikoj. Tiun kategorion nerekte fiksas la uzado ĉe Zamenhof kaj la bonaj aŭtoroj.

Tamen por la grandega plimulto de la radikoj tiu kategorio estas evidenta: *arbo, elefanto, patro, tablo* estas substantivaj; *bela, granda, nobla, tenera* estas adjektivaj; *bati, fari, marŝi, ridi* estas verbaj. En ili la finaĵo, vidpunkte de la signifo, estas senutila, pleonasma. Nur por kelkaj dekoj da radikoj eblas heziti; kaj por tiuj dubaj okazoj la alternativo plej ofte konsistas en tio, ĉu temas aŭ ne temas pri verbaj radikoj.

Por tion decidi, ni apogis nin sur la § 3, 2 de la Rekomendoj pri vortfarado (“Aktoj” p.69^F), kiu tekstas:

“2) kun radikoj de verba kategorio la finaĵo -o havas la signifon de ago kaj konkreta manifestiĝo aŭ rezulto de tiu ago; ekz-e: la kuro, la danco, la konstruo. Kontraste, aĵ montras ion konkretan estigitan de la ago, dum *ad* havas la signifon de ago konsiderata en sia daŭro; ekz-e: la dancado, la konstruado, la konstruaĵo.”

Rezultas el tiu teksto, ke, se o-derivaĵo de radikoj supozita verba neniam povas signifi *agon*, ĝi tutsimple ne estas verba radikoj.

Ekzemple, *floro*, *pako*, *urino* neniam signifas *agon*, sed male ion tute konkretan; sekve la radikoj *flor/*, *pak/*, *urin/* ja ne estas verbaj sed substantivaj. Plie de tiuj substantivaj radikoj tute logike kaj facile deriviĝas la verboj *flori*, *paki*, *urini*. Kaj tio plene respondas al la preskriboj de Zamenhof en siaj vortaroj rusa, germana kaj franca kaj ankaŭ al la uzado ĉe la bonaj aŭtoroj.

Ni notu tie ĉi, ke, por fiksi tiujn kategoriojn, la Akademio sin apogis, krom sur la oficialaj dokumentoj, ankaŭ sur la laboroj de Eugen WÜSTER, kiel ni jam diris en I.

B. OFICIALECO DE LA RADIKOJ

Estis de tre alta intereso konstati, ke nur en la tri lastaj grupoj de B.R.O. enestis radikoj neoficialaj, kiam la laboro estis entreprenita.

La Akademio opiniis, ke estus pli bone, se la koncernaj radikoj konsistigus parton de la 8-a Oficiala Aldono, kaj ĝi do entreprenis ankaŭ la prilaboron de tia oficialigo. Tio cetere per si mem ŝtopos grandegan breĉon inter la oficiala vortaro kaj la vortaro efektive uzata en la nuna lingvo.

En la Grupo 7 estis 4 neoficialaj radikoj: *aŭtobuso*, *drato*, *filmo*, *oferti*.

En la Grupo 8 estis ĉirkaŭ 40 kaj en la Grupo 9 ĉirkaŭ 140.

C. DISKUTO PRI KELKAJ VORTOJ

Okaze de la preparo de B.R.O. la Akademio estis frontita kun diversaj leksikologiaj problemetoj. La rezultoj de tiuj diskutoj jam parte aperis en la Aktoj kaj parte aperas jen en aparta ĉapitro de la 8-a Oficiala Aldono, jen kiel piednotoj en B.R.O. mem, depende de la naturo aŭ graveco de la rimarkigoj.

La Direktoro de la Sekcio
pri la Ĝenerala Vortaro,
D-ro A. Albault.

67. 117 Kiel? Vi ne estis enterigita?—Mi estis enterigita.
Was? Du bist nicht begraben worden?—Ich bin begraben worden.
68. 118 Tiu ĉi homo malkaŝis al mi, ke mi estis kondamnita al morto
Dieser Mann entdeckte mir, wie ich zum Tode verurteilt gewesen
69. 120 Ankoraŭ neniu mortemulo estis tiele honorita kiel vi!
So ist noch kein Sterblicher geehrt worden wie Du!
70. 143 Jam restas difektita, kio estis difektita
Schon bleibt verdorben, was verdorben ist
71. 127 Ve al vi, se ĉio estis kalkulita, se oni prezentos al vi la kalkulon ankoraŭ en tiu
ĉi nokto
Weh dir, wenn's nachgezählt worden wäre, wenn's Dir vorgezählt würde diese
Nacht noch.

III. A) *estos -ata* (ekz. *mankas*)

B) *estos -ita* (No 72-82)—El tiuj ĉi 11 ekzemploj 8 respondas al germ. simpla Futuro (Futurum 1.) kaj 3 (No 78, 79, 81) al germana Prezenco (kiu tamen, laŭsence, esprimas Fut. 1.).

72. p. 9 tiu iam mortos kaj estos forgesita
der wird einmal sterben und vergessen werden
73. 30 li estos rekompencita reĝe
er soll königlich belohnt werden
74. 68 mi ĵuras, ke li tamen ankoraŭ estos pendigita
ich schwöre darauf, er wird doch noch gehangen werden
75. 72 viaj faroj estos pardonitaj ĝis plena forgeso
so soll die Strafe bis auf das letzte Andenken erlassen sein
76. 77 centoble tio ĉi estos venĝita
wie das zehnfach und wieder zehnfach geahndet werden soll
77. 106 kaj tiu amo neniam estos rekompencita.—Ne, en la ĉielo ĝi estos rekompencita
ihre Liebe wird ewig niemals belohnt.—Nein, sie wird im Himmel belohnt
78. 111 Baldaŭ ĉio estos plenumita
bald ist alles erfüllt
79. 120 ĝis la vestoj estos ruĝege makulitaj
bis euer aller Kleider scharlachrot gezeichnet sind
80. 128 sed li estos malbele trompita
aber er wird garstig betrogen
81. 141 se unu estos perdita, ja ne estos io grava
einen kann er leicht missen
82. 142 kaj ĉio estos finita
und dann wird's vorbei sein

IV. A) *estus -ata* (No 83-85)

B) *estus -ita* (No 86-90)—Ankaŭ tie Zamenhof uzas jen -ata, jen -ita:

(85) *estus aerumata* — würde ausgelüftet

(89) *estus pagita* — würde bezahlt

A) *estus -ata*

83. p. 9 se vi ne estus devigata nomi tiun filon via
wenn Ihr diesen Sohn nicht den Euren nennen müsstet
84. 25 kaj tiamaniere ĝi estus aĉetata de granda amaso
und so ging's reissend ab
85. 64jen tial la aero, en la ĉirkaŭspaco de tutaj horoj, tiel malbonodoris, kvazaŭ la
tuta vestaro de Moloĥ estus aerumata ...
.....drum stank auch die Luft stundenweit, als würde die ganze Garderobe des
Molochs ausgelüftet

B) *estus -ita*

86. p. 26 alia reĝo estus tiel forsilentita....
mancher König überhüpft würde
87. 39 tiam vi estus kovrita per oro
dann solltest Du mit Gold überzogen werden
88. 73povus devigi plenumi sian vorton, eĉ se ĝi estus donita al la Satano
.....könnte sie zwingen, Wort zu halten, wenn sie es auch dem Satan gegeben hätten
89. 80 En tia okazo almenaŭ unu ŝvito estus pagita
und so würde doch ein Schweiss bezahlt
90. 131 Pli bone estus al li, se li neniam estus naskita
Ihm wäre besser, wenn er nie geboren wäre

V. A) *estu -ata* (ekz. *mankas*)

B) *estu -ita* (No 91-96)

91. p. 19 Malbenita vi estu..... malbenita mi estu.....
Verflucht seist Du..... verflucht sei ich
92. 35 ĝi estu dekalkulita de via vivo
sie werde Dir von Deinem Leben abgezogen
93. 36 estu malbenitaj
seid verdammt
94. 83 ke estu permesite al mi fariĝi.....
dass ich werden dürfte
95. 99 malbenita estu
verflucht sei
96. 132 ordonu, ke ĉiuj malliberuloj estu liberigitaj
alle Gefangenen sollen los sein und ledig

VI. A) *esti -ata* (No 97-101)

B) *esti -ita* (No 102-106)—Refoje, en la sama germ. konjugacioformo jen -ata, jen -ita. Kial?

- p. (97) esti respektata—respectiert zu werden
(102) esti malbenita—verflucht zu werden.....Kial?

A) *esti -ata*

97. p. 26 esti respektata de grandaj kaj malgrandaj
von Gross und Klein respectiert zu werden
98. 44 kiel dolĉe estas esti enlulata en la dormon
wie süß ist's eingewiegt zu werden in den Schlaf
99. 44 jes, dolĉa ĝi estas esti enlulata
ja, süß ist's eingewiegt zu werden
100. 135 Se li estos inda por esti nomata via filo
Wenn er's wert ist, Euer Sohn zu heissen
101. 144 Ĉu vi pensas, ke pekegoj povas esti estingataj per pekego?
Meint ihr wohl gar: eine Todsünde werde das Äquivalent gegen Todsünden sein?

B) *esti -ita*

102. p. 31 ĝi estas dolĉa esti malbenita de via patro! Diru, kion oni devas fari, se oni volas esti malbenita de li?
es ist süß, von deinem Vater verflucht zu werden! Sprich, was muss man tun, wenn man von ihm verflucht sein will?
103. 54 La nokto devis esti beligita per iu faro
so musste die Nacht noch durch einen Streich verherrlicht werden
104. 68 ĉiuj hundoj devas esti deĉenigitaj kaj pelitaj en ilian mezon
auch müssen alle Hunde los und in ihre Glieder gehetzt werden
105. 77 kaj esti por ĉiam liberigita
und auf ewig verschont
106. 143 ĉi tio kompreneble devis esti pagita
dies musste freilich bezahlt werden

* * *

ĈEFAJ KARAKTERIZAĴOJ DE LA ZAMENHOFA LINGVAĴO EN MALAKORDO KUN ATISTAJ VARIANTOJ

Ĉe Zamenhof

a) "*estas -ita*" estas ĉiam prezenco; germ. ĉiam la helpverbo "sein", neniam "werden". Ĝi do neniam respondas al germ. Perfectum (aŭ simpla Preterito).

b) "*estis -ita*" respondas al germ. formoj de PASEO, t.e. Imperf. aŭ Perfectum (simpla Preterito).

c) "*estos -ita*" respondas al germana Fut. I. (simpla futuro). Helpe de kunteksto ĝi respondas ankaŭ al Fut. II.

KONKLUDIGAJ KONSTATOJ

I.— La participfinaĵoj havas nenian influon sur la tempojn de la konjugacio, nek sur la modojn, kiel montras la sekvantaj ekzemploj, kiuj, en sia paralela prezento, apartenas al la sama konjugacia tempo aŭ al la sama modo kaj kiuj tamen tradukiĝas jen per -ata (kol. A), jen per -ita (kol. B).

	A		B
Imperf. ...	(47) wardst gehalten	(50)	ward gestammelt
Perfect	(48) seid geliebt worden	(67)	bin begraben worden
Fut. I.	(°) wird geliebt werden	(72)	wird vergessen werden
Kondiĉ ...	(85) würde ausgelüftet	(89)	würde bezahlt
Imperat ...	(°) seid geliebt	(93)	seid verdammt
Infinit	(99) eingewiegt zu werden	(102)	verflucht zu werden

Kiel, kaj laŭ kiu kriterio, ekspliki tion al lernanto?

(°) En tiu ĉi verko de Zamenhof ne ekzistas ata-ekzemploj por Fut. I. kaj Imperativo, sed estas memkompreneble, ke ĉiuj ata-ekzemploj el la aliaj kategorioj validas ankaŭ en Fut. kaj Imperativo.

II.— En PREZENCŬ la ata- kaj ita-ekzemploj tre nete distingiĝas unu de la alia *ankaŭ en la responda germana teksto*:

La ekz. 1-10 (ata) ĉiam respondas al germ. helpverbo “werden”
la ekz. 11-46 (ita) ” ” ” ” ” “sein”,

SED en PASEO, FUTURO kaj en ĉiuj manieroj “ita” respondas jen al “werden”, jen al “sein”, kiel klare evidentiĝas:

	SEIN		WERDEN
Imperf	(56) war verkauft	(50)	ward gestammelt
Perfect	(68) sei verurteilt gewesen	(66)	ist unterbunden worden
Fut. I.	(82) wird vorbei sein	(74)	wird gehangen werden
Kondiĉ ...	(90) wäre geboren	(86)	würde überhüpft
Imperat ...	(93) seid verdammt	(92)	werde abgezogen

Kiel ekspliki, ke manieroj apartenantaj al sama konjugacia tempo aŭ al sama modo, *sed kiuj* en la germana teksto diferencas per “sein” kaj “werden”, troviĝas en Esperanto sub la sama formo “ita”??

Ĉio tio ŝajnas, kaj efektive estas eksterordinare komplika, se oni serĉas la eksplikon, kie ĝi ne estas! Sed ĉio fariĝas simpla, se oni akceptas la gvidan fadenon:

- a) -ata = “ago ankoraŭ daŭranta” aŭ “ago ripetiĝanta ĝenerale, kutime, k.s.”. “ata” respondas al la ideo “plu kaj plu” aŭ “re-kaj-ree . . . ”
- b) -ita = konstato pri ago finiĝinta. —Nu, kiam oni povas diri pri ago, ke ĝi estas (estis, estos . . .) finiĝinta? Certe ekde la unua momento mem, kiam komenciĝas (-is, -os . . .) la post-aga stato kaj ĝuste tiun momenton montras Zamenhof en ĉiuj konjugaciaj manieroj per la sufikso “ita” (germ. werden).

Kiam ita estas uzata predikate, la tempopunkto estas nedifinita (ekzemple ĉiam en PREZENCŬ) kaj respondas al la germ. “sein”, “ita” respondas al la ideo “definitive”.

La PRUVO per DU EKSPERIMENTOJ

- 1) Oni rerigardu ĉiujn ekzemplojn (No 1-106) metante (mense) *post* ĉiu ata-ekzemplo la kontrolkliŝon “plu kaj plu aŭ re-kaj-ree . . .” kaj *antaŭ* ĉiu ita-ekzemplo la kontrolkliŝon “definitive”. Oni vidos kaj komprenos, laŭ kiu kriterio Zamenhof uzis la sufiksojn ata kaj ita.

Se surbaze de la samaj kontrolkliŝoj, oni tradukas el la germana (aŭ kiu ajn alia lingvo), oni retrovos la sufiksojn ata kaj ita ĝuste tie, kie ankaŭ Zamenhof metis ilin!

- 2) Oni prenu kiel gvidilon la konjugacitabelon de L. E. MEIER (troveblan ĝis hodiaŭ en atistaj lernolibroj) kaj faru tradukon de “Die Räuber”. Oni konstatos proksimuman akordon kun la teksto de Zamenhof nur en PREZENCŬO, sed en la aliaj tempoj kaj en la modoj oni konstatos DEVION disde la Zamenhofa teksto je precize kaj kontroleble

63,33%

Kiel malproksimaj ni estas de certaj statistikaj fantaziaĵoj!

RAYMOND SCHWARTZ

S-ro Wilh. Wingen faris similan, same konkludigan laboron pri “FABELOJ DE ANDERSEN”. Ankaŭ “La Rabeno de Baĥaraĥ” kaj “Ifigenio” estas zorge esploritaj kaj konfirmas la ĉi suprajn konkludojn.

Kio nun estas la Zamenhofa lingvaĵo, ne plu estas pridubata.

R. S.

1. PRI LANDNOMOJ

Fine de plurjara studado pri la landnomoj mi alvenis al kelkaj konkludoj, kiujn mi koncize prezentas ĉi-sube. Tiuj studoj baziĝas sur historia studo de la demando — ĉefe en niaj institucioj — kaj sur kompara studo el 33 lingvoj; el ili 13 estas la 13 plej parolataj en la mondo kaj inkluzivas la ĉinan, la araban, la indonezian, la hindian, la bengalan kaj la japanan; ties parolantoj prezentas pli ol la duonon de la homaro. La 20 aliaj estas ĉefe la aliaj precipaj lingvoj de Eŭropo.

1. Ne eblas starigi “universalan” sistemon, en kiu ĉiuj landnomoj estus derivataj de la landanomoj (la primitiva Zamenhofa sistemo de “Holandujo”, “Amerikujo” ktp jam de longe forgesiĝis), nek inverse, kvankam sufiĉe multaj, ĉefe aziaj, lingvoj perfekte praktikas tiun duan sistemon (“itali-homoj”, “rumani-homoj” ktp). Ne eblas, ĉar la internacia praktiko — al kiu aliĝis la Esperanta tradicio — distingas du procedojn de nomado: “lando/landanoj” kaj “homoj/homujo”.

2. La nuna Esperanta sistemo komence estis kompromiso, starigita sub la influo de L. de Beaufront, inter la primitiva Zamenhofa sistemo kaj la internacia duproceda sistemo. Bedaŭrinde tiu kompromiso baziĝis sur etnologia principo: raso donas sian nomon al lando helpe de la sufikso -uj. Sed, kiel atentigis Grosjean-Maupin en memorinda Akademia memuaro, “raso estas mito”. Evidentas, ke la internacia lingvo devas apogiĝi sur lingvaj faktoj, t.e. sur internacieco laŭ la paragrafo 15a de sia Fundamento, kaj ne sur rapide evoluanta mito. Cetere la praktiko kondukis al iom-post-ioma malobservo de tiu etnologia principo fremda al la Fundamento; efektive la ĝermo de tiu malobservo estis jam la dekomenca neapliko por la kelkaj landnomoj, kiuj internacie finiĝis per *-land*: *Holando*, *Islando* ktp (anstataŭ la *holandoj*, *islandoj* ktp). Per tiu etnologia principo ni konstruis apartan sistemon, ja duprocedan kiel la internacia, sed propran nur al Esperanto: tion farante, ni malobservis la paragrafon 15an kaj la internaciecon.

3. El la duopo “landnomo/landan-nomo”, la landnomo ĉiam estas la pli internacia. Ekz-e pluraj aziaj lingvoj uzas nur derivaĵojn por nomi la landanon, sed ili konservas senŝanĝa la internacian nomon de la lando: *Itali-*, *Bulgari-* ktp. Pli ĝenerale la sufiksoj respondantaj al la Esperanta *-an-* estas tre diversformaj laŭ la lingvoj, dum la sufikso respondanta al la Fundamenta *-uj-* ekzistas en ĉiuj lingvoj tra la mondo sub la formo *-i-*. La fakto, ke tiu internacia *-i-* ŝtoniĝis en aziaj lingvoj, kiuj sisteme uzas derivitajn landano-nomojn, ne esence modifas niajn konsiderojn; la landnomoj finiĝantaj per *-i-* estas monde internaciaj, monde konataj.

4. La tiel nomataj “Akademiaj kondamnoj” de la tiam nova sufikso *-io* fakte estas bazitaj sur tendenca interpreto de pli frua Akademia teksto, publikigita sub Boirac. Se tiu erara interpreto devus esti ĝusta, tio signifus, ke estas same kondamnindaj diversaj aliaj sufiksoj, i.a. la sufikso *-enda*, intertempe oficialigita de la Akademio.

5. La sufikso *-io-* estas plene konforma al la Esperanta strukturo. La fakto, ke ĝi duobligas la sufikson *-ujo*, neniel faras ĝin kontraŭfundamenta, ne pli ol la sufiksa uzado de *-arbo* estas kontraŭfundamenta, kvankam ĝi tiel same duobligas tiun saman sufikson. Cetere la Antaŭparolo de la Fundamento klare aludas la metodon de “neologismoj kaj arkaismoj”, per kiu Zamenhof pli ol unu fojon montris, kiel la lingvo povas evolui: la historio demonstras, ke la Esperanto-komunumo ne trouzis tiun metodon! La kazo eĉ estas unika, kaj temas pri sufikso monde konata ekster Esperanto.

6. La sufikso *-io* nuntempe estas akceptita jam delonge de ĉiuj esperantologoj, almenaŭ por akcesoraj uzoj, cetere plene konformaj al la internacieco, ĉe landnomoj derivitaj ne de landano-

nomoj, sed de aliaj nocioj: *Alĝerio, Liberio, Kolombio* ktp. Al tiuj ĉi ni aldonu nomojn derivitajn, sed nur el etimologia vidpunkto: *Mezopotamio, Indonezio, Aŭstrio* ktp.

7. La sufikso *-io*, en pli ĝenerala uzo (*Francio, Germanio* ktp), ekuzata en Esperanto jam ĉirkaŭ 1900, do jam antaŭ 70 jaroj, estas abunde uzata de pli ol 50 jaroj en ĉiaj Esperantistaj medioj. Certe, multaj aliaj detenas sin de ties uzado pro la konataj “kondamnoj”. Kaj tio estas sekuriga pruvo pri la morala potenco de la Akademio. Aliflanke la persisto de multaj per si mem dubigas pri la praveco de la iam faritaj “kondamnoj”. Efektive, apud multaj individuoj kaj redakcioj, almenaŭ unu internacia organizo, sekvante Hodler, la fondinton de UEA, daŭre uzas nur ĝin kaj rigardas *-uj-* kiel arkaisman por landnomoj. Evidentas, ke vojo al unueco de nia nomenklaturpo povos pasi nur tra unu pordo—levo de la kondamno.

8. Tamen ekzistas diversaj troigoj en la uzado de *-io* fare de ĝiaj subtenantoj, kaj tiuj troigoj ne estas la samaj ĉe ĉiuj. Estas konsilinde eviti ilin, se ni volas atingi unuecon. Bazo de unueco, post fiasko de la diversaj sistemoj, povas esti nur la monda internacieco, alidire la apliko de la paragrafo 15a! La monda internacieco de tiuj propraj nomoj prezentas rimarkindan unuecon.

Mallonge, la aluditaj troigoj estas ĉefe:

- tendenco krei novan “universalan” sistemon per *-i-*derivado; ĝi fakte arbitre transigas nomon de unu klaso al alia (ekz-e *nepalaj, kanadoj* loĝantaj en *Nepalio, Kanadio* ktp);
- tendenco krei purajn esperantismojn por distingi landnomojn disde samnomaj geografiaj nocioj (ekz-e *Panamio, Meksikio* anstataŭ *Panamo, Meksiko* ktp). Landnomoj estas internacie pli gravaj: oni prefere distingu laŭ la manieroj proponitaj de la naciaj lingvoj mem (ekz-e per *Meksikurbo* ktp).
- ignoro de aliaj internaciaj formoj ol *-i-*. Tiuj uzas derivadon ĉefe per *-land-* aŭ per *-istan-*. Estas notinde, ke Zamenhof almenaŭ unu fojon uzis derivadon per *-mark*, ĉe *Finn-marko* (norvega provinco).

9. Por reatingi unuecon en la nomenklaturpo, mi opinias, ke ni devas en unua stadio fari kelkajn paŝojn:

- I. – a) agnoski kiel definitivajn fakte tre multajn radikojn aŭ de landnomoj aŭ de landano-nomoj, ĉar ili estas konformaj kaj al nia tradicio kaj al la internacieco. Mi volonte aldonus al ili pro simpleco de la prezento tiujn formojn, kiuj estas uzataj nur de parto el la esperantistaro (tiajn mi signas per asterisko), sed estas same absolute internaciaj. Feliĉe tiuj agnoskindaj formoj estas la granda plimulto.
 - b) atentigi pri kelkaj formoj, kies klasigo estas duba;
 - c) atentigi pri kelkaj formoj, kiuj ne estis plej taŭge elektitaj laŭ la vidpunkto de la internacieco: plej tipa estas *litov*, kies internacia formo *lituan* ekzistas, eĉ en la lituana lingvo sub formo de derivaĵoj (“lituan ísta”, “lituan ístika”, ktp).
- II. – a) Forigi la kondamnon de la internacia *-i-*, tamen admonante al uzado konforma al la internacieco: cetere nenion alian oni faras jam nun, kiam oni preferas *Skotlando* al *Skotujo*.
 - b) konsili liberecon de uzado koncerne al la dubaj formoj, tiel ke iom post iom pli taŭgaj formoj enuziĝu, kaj ke Esperanto fariĝu en tiu punkto almenaŭ tiel same internacia, kiel neeŭropaj lingvoj. Almenaŭ, se la esperantistaro tion deziras.

- c) proponi provizorajn sed konkretajn formojn por tiuj nomoj, kiuj ĝis nun estas dubaj. Tiuj provizoraj formoj povus esti formitaj aŭ per *-land-* aŭ eĉ per *-uj-*. Ekz-e Britio estas nura esperantismo, dum ekzistas tre internacia formo (*Britanio*); *Britujo* aŭ *Britlando* povus tuj esti uzataj de tiuj, kiuj hezitus ekuzi novan formon.

La subskribinto intencas publikigi libron pri tiu temo; ĝi revivigos la pensojn kaj farojn de eminentaj personoj, kiel de Beaufront, Boirac, Cart, Hodler, Privat kaj multaj aliaj, ne parolante pri Zamenhof mem. Ĝi ĵetos fortan lumon sur forgesitajn aŭ ne tre konatajn faktojn, kaj proponos solvon al nia problemo, kune kun nova filozofio pri la Esperanta movado.

D-ro A. Albault

LISTOJ

(Tiuj listoj principe limiĝas al tiuj nomoj, kiuj estis objekto de intensiva studo: entute 92 landnomoj kaj la respondaj landano-nomoj. Tiuj nomoj estis konservitaj pli pro sia lingva intereso, ol por geografia celado; ili rilatas al sendependaj ŝtatoj aŭ al provincoj, al modernaj aŭ antikvaj landoj).

I. Internaciaj nomoj jam en uzado. (asterisko signas la formojn, kiujn ne ĉiuj uzas)

a) *Landano-nomoj* (el ili deriviĝas landnomoj per la sufikso *-uj-*, aŭ prefere per la sufikso *-i-* konforme al la internacieco).

abisenoj °	etiopoj	italoj	patagonoj
albanoj	francoj	jugoslavo	persoj
araboj	germano	laponoj	rumanoj
armenoj	grekoj	latvoj	rusoj
belgoj	hispanoj	manĉuroj	skandinavo
bulgaroj	hungaroj	* maŭritanoj	svedoj
ĉeĥoslovakoj	hindo	mongoloj	turkoj
estonoj	iberoj	norvegoj	

° la internaciaj formoj estas respektive *abisin-* kaj *indi-*; *abisenoj* kaj *hindo* prezentas akceptindajn asimilitajn formojn.

b) *Landano-nomoj alimaniere derivitaj:*

finnoj/Finnlando skotoj/Skotlando afganoj/Afganistano

c) *Landnomoj* (el ili deriviĝas landano-nomoj per la sufikso *-an*)

Arĝentino	* Honduro	Libano	Peruo
Birmo	Irako	Libio	Sirio
Brazilo	Irano	Luksemburgo	Sudano
Cejlono	* Israelo	Maroko	Tibeto
Ĉilio	Kanado	Meksiko	* Ukraino
Ekvadoro	Kongo	Nikaragvo	Urugvajo
Gvatemalo	* Koreo	Pakistano	Venezuelo
* Gviano	Kostariko	Panamo	* Vjetnamo
Gvineo	Kubo	Paragvajo	

*Groenlando Irlando Islando Nederlando

Aŭstrio (el “aŭstr-” = oriento)
Bolivio (el la nomo Bolivar)
Alĝerio (el urbo Alĝero)
Aŭstralio (aŭstrala lando)
Liberio (el “libero”)

Polinezio (lando de multaj insuloj)
Siberio (el urbo Sibir)
Niĝerio (el rivero Niĝero)
Tunizio (el urbo Tunizo)

II. Esperantaj nomoj ne konformaj al la ekzistanta internacieco.

a) *Estas dubaj pro malĝusta klasigo* (efektive la radikoj nomas la landon aŭ en ĉiuj lingvoj aŭ en la granda plimulto el ili)

Ĉin- Egipt- Japan- Portugal- Svis-
(la formo *Japon-* estus pli taŭga)

b) *Estas dubaj jenaj radikoj:*

britoj litovoj poloj
ĉar pli internaciaj estas jenaj landnomoj:

Britan-io Lituan-io Polon-io

c) La radikoj *angloj* kaj *danoj* estas tute bonaj, sed eblas heziti por la derivaĵo, ĉar la latinaj nomoj *Anglia* kaj *Dania* akiris nur slavan internaciecon, kaj la plimulto el la lingvoj preferis aliajn formojn, nome *England* (Angllando) kaj *Anglotero* por la unua, kaj *Dan-marko* por la dua.

—A.A.

II. STATISTIKO PRI LANDNOMOJ

En la antaŭa artikolo mi aludis pri listo de 92 landnomoj. Surbaze de tiu listo estis starigita glosaro en 33 lingvoj, el kiuj 13 estas la 13 plej parolataj en la mondo kaj kune reprezentas pli ol la duonon de la parolanta homaro (nome la lingvoj angla, araba, bengala, ĉina, franca, germana, hindia, hispana, indonezia, itala, japana, portugala, rusa), dum la 20 aliaj estas aliaj ĝermanidaj, latinidaj, slavaj aŭ ceteraj eŭropaj lingvoj, kaj ankaŭ du neeŭropaj (la korea kaj la turka). Multaj el niaj kolegoj min helpis en tiu laboro: mi varme dankas ilin pro ilia valora kontribuo. Aparta mencio estu pri nia bedaŭrata kolego D-ro Pumpr, kiu liveris modele sciencan laboron pri la ĉeĥa kaj slovakaj lingvoj.

Tiu glosaro ebligas konatiĝi kun la reala internacieco de la landnomoj; ĝi ebligas renversi falsajn opiniojn kaj mitojn pri tiu demando. Ni konsideros sinsekve la strukturon de la landnomoj rezulte de tiu internacia komparo, la radikojn mem de tiuj landnomoj funkcie de ilia internacieco, kaj fine statistikon, kiu ebligas mezuri iel tiun internaciecon sufiĉe homogenan kontraste al la ĥaoso, kiu regas en la nuntempa Esperanto.

LA STRUKTURO

Ekzistas tri eblaj strukturoj: simpla, sufiksa kaj kunmeta. Kompreneble temas pri skema strukturo internacie rigardata; ekz-e ni konsideros, ke la franca “Finlande” estas kunmeta, kvankam eble franco tion ne konscios aŭ ne agnoskos; nur tiel eblas fari utilan internacian komparon.

La sufiksa strukturo estas trovebla en ĉiu el la 33 lingvoj kaj koncernas, laŭ la lingvoj, nombron da landnomoj variantan inter 23 kaj 54 el la 92 de la listo. La sufiksoj alligiĝas al radikoj diverssignifaj (popolo, geografia nocio, propra homnomo ktp., kaj iafoje al radiko, kies signifon povas instrui nur la etimologio). En la granda plimulto de la lingvoj la sufiksoj estas vivantaj; en kelkaj ili estas rekoneblaj nur etimologie. Inter la sufiksoj, la sufikso *-i-* estas universala kaj troviĝas en ĉiuj lingvoj; ĝin vestas diversaj finaĵoj kaj ofte pluraj en unu sama lingvo (ekz-e; *-ie*, *iĉ*, *-ien*, *-ia*, *-ija* ktp). La aliaj sufiksoj estas en neglektebla kvanto (ekz-e: *-ei* en la germana: *Türkei* ktp); unu

escepto: la finaĵo *-sko* en la ĉeĥa kaj slovaka (en respektive 31 kaj 38 nomoj) kaj *-ska* en la serbo-kroata.

Plej uzas la sufikson *-i-* la lituana, la (moderna) greka, la pola kaj la rumana; poste sekvas la slavaj (rusa, bulgara ...), la sudaj latinidaj (itala, hispana) kaj la finna. Meze troviĝas la ĝermanidaj, la hungara kaj la araba. Malplej uzas la sufikson *-i-* la franca kaj neeŭropaj lingvoj, kiel la japana, la hindia, la indonezia, la araba, la bengala, la turka, la korea kaj la ĉina: tiuj lingvoj kontentiĝas per ĉirkaŭ 30 nomoj finiĝantaj per la *i-*sufikso.

La kunmeta strukturo estas trovebla en ĉiuj lingvoj kaj en nombro varianta, laŭ la lingvoj, inter 27 kaj 3. La plej kunmetemaj estas la ĝermanidaj, tamen preterpasitaj de la hungara; meze troviĝas la neeŭropaj; la malplej kunmetemaj estas la latinidaj kaj la slavaj, la greka, la finna kaj la lituana.

La plej ofta kunmeto ekzistanta en ĉiuj lingvoj estas tiu per *-land-*; ankaŭ *-(i)stan-* troviĝas en ĉiuj lingvoj. Poste sekvas *-mark-*, trovebla en 12 el la 13 grandaj lingvoj de la mondo, kaj en 11 el la 20 aliaj lingvoj de nia laboro; ni ĉi-sekve raportos tiujn du nombrojn per jena skribmaniero: (12 + 11). *-mark-* estas efektive trovebla ankaŭ en jenaj neeŭropaj lingvoj: ĉina, araba, hindia, indonezia, korea. Ekzistas aliaj kunmetoj, sed en nia glosaro oni trovas nur unu el ili nome *-ter-*, kiu troviĝas en 9 lingvoj (5 + 4).

La simpla strukturo. Temas pri radikaj nomoj: ili finiĝas jen per konsonanto, jen per vokalo: plej ofte *-a* en la plej multaj lingvoj, sed ekz-e *-e* en la franca. Tiu strukturo koncernas, laŭ la lingvoj, 29 ĝis 50 nomojn el nia listo de 92. La ĉina kaj la franca venas ĉekape; sekvas la neeŭropaj kaj la angla; meze troviĝas la ĝermanidaj kaj la sudlatinidaj; finas la vicon la slavaj, la hungara, la rumana kaj la lituana.

LA RADIKOJ KAJ LA INTERNACIECO

El la listo de 92 landnomoj, 74 prezentas senduban internaciecon. Aliparte la nombro de landnomoj konformaj al la internacieco varias, laŭ la lingvoj, de 45 al 71: la angla kaj la rumana estas ĉekape kun 71, sekvataj de la itala (70); poste sekvas la granda plimulto de eŭropaj lingvoj—eĉ la hungara, la finna kaj la lituana—inter 67 kaj 60 kune kun neeŭropaj lingvoj, la indonezia, la japana, la hindia kaj la korea; malpli favorataj inter la grandaj lingvoj estas la araba (54) kaj la ĉina (45).

Kontraste, la nombro de landnomoj konformaj al la internacieco varias en Esperanto (jes! varias en Esperanto) de 37 al 65; ekz-e ĉe UEA ĝi estas 42, t.e. malpli ol en la ĉina, dum ĉe SAT ĝi estas apenaŭ pli granda, nome 54, t.e. ĝuste kiel en la araba. Ni tamen notu tuj, por trankviligi la legantojn, ke tiu kontrasto devenas ĉefe el la misuzo de sufiksoj, kaj do estas relative facile nuligebla.

Efektive, plej ofte la radikoj uzataj en Esperanto estas ĝuste la internaciaj *forme* kaj *signife*. Plej ofte, sed ne ĉiam: kelkaj estas nur forme konformaj al la internacieco; internaciece, oni nomas la landon mem per jenaj radikoj *Ĉin-* (9 + 15), *Egipt-* (8 + 18), *Svis-* (7 + 9). Ni parenteze notu, ke nur en kelkaj okcidentaj lingvoj *svis-* signifas ankaŭ la loĝanton.

Forme, oni hezitis kaj plu hezitas, sed *Gvian-* (6 + 7) estas la plej internacia, pli internacia ĉiuokaze ol *Gujan-* (1 + 5) kaj *Gvaj an-* (2 + 4). La sola internacia formo konsiderebla estas *Lituani-* (11 + 7), dum *Litovi-*, nete tro artefarita (kio estas klimakso por propra nomo!) troviĝas en absolute neniuj lingvoj; la radiko *litov-* troviĝas nur en malmultaj slavaj lingvoj (rusa, ukraina kaj slovaka) sub la derivita formo *litovec*; bedaŭrinde la najbara formo *Lietuva* signas ne la landanon, sed ja la landon mem en la lituana kaj la latva! Cetere eĉ la lituanoj konas la internacian radikon dank' al vortoj, kiel: lituanistika, lituanistas, lituanizmas ktp. Tiel same sola internacia formo estas *Britani-* (9 + 16); ĝi estas derivebla de la ankaŭ internacia *britan-*, dum *Britio* estas pura esperantismo kaj aliflanke unu el tiuj formoj, pro kiuj multaj leviĝis kontraŭ la internacia sufikso.

La kunmetaĵo *Dan-mark-* (12 + 11) estas trovebla en la plej multaj lingvoj, dum *Dani-* estas nur slave kaj orient-eŭrope konata, malgraŭ sia latina deveno.

Se la internacieco estas neta en la granda plimulto el la nomoj, ĝi tamen ne estas tia por 18 nomoj el la listo de 92: ĉe ili 2, 3 aŭ eĉ 4 formoj interluktas en proksimuma egaleco. Tia granda proporcio de dubaj formoj ne mirigu nin, ĉar la listo entenas la plej konatajn kaj plej malnovajn nomojn; ni povas logike atendi, ke malpli konataj nomoj kaj nove nomitaj landoj ordinare tuj ĝuas mondan internaciecon, cetere identan al la nacia nomo mem.

Feliĉe 14 el tiuj 18 dubaj respondas al Esperantaj formoj, kiuj el diversaj kaŭzoj povas esti konfirmitaj; ili apartenas al la pli-malpli uzataj jenaj: *Birmo*, *Brazilo*, *Ĉilio*, *Francio*, *Germanio*, *Hindio*, *Hispanio*, *Laponio*, *Latvio*, *Libano*, *Nederlando*, *Norvegio*, *Skotlando*, *Svedio*. La kvar ceteraj estas jenaj:

Angli- (1 + 8), *Anglo-ter-* (5 + 4), “*England*” (5 + 5)

Japon- (3 + 2), *Japoni-* (1 + 8), *Japan-* (6 + 7)

Poloni- (4 + 6), *Pol-* (1 + 5), “*Polsko*” (1 + 5), *Poland-* (7 + 1)

Portugal- (11 + 9), *Portugali-* (1 + 7)

El tio oni konstatas, ke la du esperantismoj *Japanio* kaj *Polio* havas neniun subtenon en la naciaj lingvoj: oni trovas *Polija* nur en la latva (lingvo ne inkludita en la Glosaro), sed *Japani-* nenie! *Poland-* troviĝas en la angla kaj en la aziaj lingvoj submetitaj al ĝia influo. La radiko *polon-*, latina radiko, troviĝas diverslingve en kunmetaĵoj kiel *polon-ism-* ktp, ŝatinda konstato por internacia lingvo. *Angli-* kaj *Portugali-* estas nur slave kaj orient-eŭrope internaciaj. *Portugal-* nepre estas la internacia formo: la alia estas neglektebla. *Angli-* estas la latina formo; ĝin ne konservis okcidento; angloj donas al ĝi alian pli limigitan signifon (ia provinco apud Londono); kaj tio parte klarigas, ke la batalo kontraŭ la nova sufikso havis fortajn radikojn en la britaj insuloj. *Angloter-* kaj “*England*” estas pli internaciaj: *Angloter-* eble estus la pli taŭga, ĉar aliaj insuloj havas la alnomon *Tero*. La dua formo malfacile enirus en Esperanton: *Angllando* ne sufiĉe similus, dum *Angllando*, ja pli simila, surprizus pro la konsonant-akumulo, sed finfine ne pli ol en la Zamenhofa *Finnmarko*.

LA ĤAOSO EN ESPERANTO

Oni ne povas negi, ke malgraŭ diferencoj la internacia nomenklaturado estas sufiĉe unueca tra la diversaj lingvoj kaj en mondaj kadroj: kiom da vortoj el la ordinara lingvo ĝuas tian vastan internaciecon? Kontraste Esperanto, kiun Zamenhof nomis “la internacia”, prezentas nuran ĥaoson por tiuj landnomoj, kiuj finfine estas propraj nomoj! Persone, mi opinias, ke ni povos eliri el tiu ĥaoso nur per agnosko de la internacieco, alidire per apliko de la 15a regulo de la Fundamenta Gramatiko: ĉiuj aliaj reguloj pri landnomoj, *unue* ne apartenas al la Fundamento, *due* montris, dum longaj jardekoj, ke ne povas krei unuanimecon ĉe la esperantistoj.

Nombroj bildigos tiun ĥaoson.

Tiujn nombrojn mi eltiris el la nuntempa konkreta uzado en diversaj publikaĵoj: nome P.I.V., la Mondmapo, la Poŝatlaso kaj ankaŭ publikaĵoj de SAT kaj de UEA. La P.I.V. prezentas tiun apartaĵon, ke ĝi indikas diversajn formojn: kun *-io*, kun *-ujo*, kun *-lando*, aŭ ankaŭ radikajn formojn. El tiu verko ni eltiris du ekstremajn listojn: liston “internacian”, kiu kolektas la formojn plej similajn al la internaciaj (tre ofte, sed ne ĉiam, la *-io*-formojn), kaj liston “neinternacian”, kiu preferas la *ujo*-formojn k.a. La Mondmapo kaj la Poŝatlaso ne prezentis problemojn, krom pri du-tri formoj kiel *Persio/Persujo*, kiuj ne enestis, kaj kiujn ni devis ekstrapoli. Por la publikaĵoj de UEA, mi starigis liston laŭ la Jarlibro de 1971 kaj laŭ la revuo “Esperanto”. Tion saman mi faris por “La Monda Lingvo-problemo”, publikaĵo de la Centro de Esploroj kaj Dokumentado de UEA, t.e. C.E.D. Por SAT, mi uzis ĉefe la Jarlibron 1971-1972, sed ankaŭ la gazeton “Sennaciulo” kaj la revuon “Sennacieca Revuo”. Tamen restis dubindaĵoj kaj mankoj en tiuj tri listoj: mi do petis helpon

de redaktoro D-ro Sadler por la du unuaj, kaj de redaktoro Bartelmes por la tria: ili ĉi tie estu dankataj pro sia komplezo.

En la ĉi-sekva tabelo po unu linio estas dediĉita al ĉiu el tiuj sep listoj. Mi aldonis por komparo du pliajn liniojn: la “eklektika sistemo”, kiu kunigas la esperantajn *formojn en uzado* plej proksimajn al la internacia stato; mi almetis al ili la *Egipto* de Kabe (troveblan ankaŭ en ekzemploj de P.I.V.), sed ne la *Danmarko* iam uzatan de UEA; aliparte esperantismojn kiel *Britlando* ktp, kiuj ebligas eviti samtempe *-uj, -i* kaj novajn radikojn. La dua plia linio estas la “internacia sistemo”, kiu diferenciĝas de la antaŭa per alpreno de kvin formoj pli internaciaj, ol la nun uzataj: *Britanio, Ĉino, Danmarko, Lituanio, Svisio*. Al tiu internacia listo sufiĉus alelekti kvar nomojn por *Anglio, Japanio, Pollando* kaj *Portugalio*, kiuj estas el la 18 dubaj formoj—ni vidis, ke la 14 aliaj povas esti konfirmitaj.

La tabelo donas kvin kolumnojn. La unua estas duobla: ĝia unua nombro koncernas la nomojn konformajn al la internacieco; la dua nombro koncernas la 18 “dubajn formojn” kaj pli ĝuste la nombro, en ĉiu listo, de nomoj konformaj al la 14 akcepteblaj en Esperanto. La dua kaj tria kolumno koncernas la nomojn uzantajn la sufiksojn *-io* kaj *-ujo*. La kvara kaj kvina donas la nombron da formoj kunmetitaj kaj radikaj.

Okazas, ke la “internacia sistemo”, obeanta la 15an regulon de la Fundamento, estas skeme tre simila al la nomenklaturu uzata en la rusa kaj la itala. Efektive la kvar nombroj 74 - 45 - 10 - 37 estas tre kompareblaj al tiuj de la rusa (63 - 46 - 9 - 37) kaj de la itala (70 - 46 - 9 - 37); kaj neniu negos, ke tia simileco estas konforma al la genio de nia lingvo. Tiu konstato donas helan punkton en la nuna malluma ĥaoso de la landnomoj.

D-ro A. Albault

STATISTIKA TABELO

	konforma al internacieco	-io	-ujo	kunmetoj	radikoj
PIV “neinternacia”	37 + 6	18	43	6	25
U.E.A.	42 + 6	15	41	10	26
Mondmapo	49 + 6	19	35	5	33
S.A.T.	54 + 12	68	0	6	18
PIV “internacia”	61 + 14	57	0	9	26
Poŝatlaso	62 + 13	57	0	10	25
C.E.D.	65 + 13	56	0	11	25
“Eklektika”	69 + 14	47	0	12	33
“Internacia”	74 + 14	45	0	10	37
	+ 4				

DIVERSAJ KONSULTOJ

1. Pri la uzo de la refleksivoj

Post kiam la Akademio oficialigis kaj publikigis la regulon pri la refleksivoj, venis al mi kelkaj leteroj, demandantaj pri tiu aŭ alia detala punkto.

La uzo de la refleksivo estas kompleksa afero, kaj eble tial ĝi neniam estis ĝis nun formulita en regulo; ĝi postulas de la uzanto apartan decidon en ĉiu okazo, nome ĉu la efikanta radiko havas la karakteron de ago kaj kiu estas la (gramatika) subjekto de tiu ago. La decidoj povas varii laŭ la speco de la radiko, laŭ la kunteksto kaj fine laŭ intenco aŭ lingvokutimoj de la uzanto. Tio klarigas, kial la Akademio provis ja difini la gvidliniojn de la uzado, sed respekti samtempe la liberecon de interpretado pri dubaj okazoj.

Praktike, la plimulto el la Akademianoj opinias:

1) ke oni devas konsideri la subjekton de infinitivo, participo aŭ substantivo nur, se ĝi estas esprimita. Tion klarigas la ekzemplo sub 1(1): “La reĝo sendis voki sian kuraciston” (same estus pri la samvaloraj “La reĝo venigis sian kuraciston” aŭ “la abatino lernigis al ŝi ŝian novican preĝon”).

2) ke la deverbaj substantivoj montrantaj personojn ne estas konsiderendaj por la uzo aŭ neuzo de la refleksivo; “servanto” estas traktenda kiel “sklavo”, “instruisto” kiel “profesoro”, aŭ “flatulo” kiel “kortegano”.

3) ke la ceteraj deverbaj substantivoj ofte povas montri egale aŭ la agon aŭ rezulton de la ago, tiel ke la decidon devas fari la intenco de la uzanto. La du lastaj ekzemploj sub 1(3) ilustras la unuan eblon, ĉar ĝi estas ĝis nun la pli ofte renkontata: “ŝi kompleze aŭdis la flatadon de ŝiaj amindumantoj” kaj “ŝi ribelis kontraŭ la interveno de (la) edzo en ŝiajn aferojn”. Sed en ambaŭ frazoj, se oni komprenus “flatado” kvazaŭ “komplimento” kaj “intervenon” kvazaŭ “enketo” aŭ “operacio”, oni tute bone povus uzi “sia”.

Pri la substantiva predikativo estas ankoraŭ tro frue por difini la uzadon, kiu hezitas inter la Zamenhofa “La Eternulo bonvolis fari vin Lia popolo” kaj la pli moderna “La reĝo faris lin sia ministro”. Estas cetere facile eviti la heziton, skribante: “La reĝo faris el li sian ministron”.

La Prezidanto,
G. Waringhien.
Aprilo 1971.

2. Pri kelkaj misuzoj

La Direktoro de la Sekcio pri Gramatiko, en akordo kun la Prezidanto de la Akademio, atentigas la redaktorojn de gazetoj, la aŭtorojn kaj ĝenerale ĉiujn uzantojn de Esperanto pri jenaj, ĉiam pli disvastiĝantaj eraroj:

a) Oni skribu “ekde” aŭ “eke de”, sed ne “ek de” per du vortoj, ĉar “ek” estas tie uzata prefikse aŭ adverbe, sed ne kiel interjekcio.

b) Oni ne uzu “dankema”, kiam ne temas pri konstanta emo al danko, sed pri la momenta manifestiĝo de danko pro konkreta servo oni simple uzu “danka”.

c) Oni ne konfuzu “kompensi” kun “rekompenci”: “kompensi” signifas havigi (al iu) ion egalvaloran pro suferita perdo, malprofito aŭ farita peno; “rekompenci” signifas montri sian kontentecon pri ies meritoj per vortoj, faroj aŭ donacoj (kvankam la bona ago ofte rekompencas la farinton propramove per sano, feliĉo, kontenteco, interna paco) “rekompenci” estas preskaŭ ĉiam “malpuni”.

H. A. de Hoog.
Junio 1973,

ĜISDATIGO DE LA ADMINISTRACIA PARTO

Notindaj estas jenaj modifoj:

1 Ŝanĝis sian adreson:

Broadribb, 34 Archdeacon Str., NEDLANDS, W.A., Aŭstralio
Rossetti, 120 Cromwell Rd, BRISTOL BS6 5EZ, Britujo ^K

2 Demisiis de la Akademio: P. Ariste kaj A. R. Haferkorn.

3 Estis elektitaj akademianoj, la 15.II.76;

D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, 205 HAMBURG 80, Federacia Germanujo

S-ro F. de Diego de la Rosa, Paseo de Teruel 38, 11, C, ZARAGOZA, Hispanujo

Prof. M. Duc Goninaz, Val Saint-Georges, Route des Pinchinats, 13100 AIX-en-PROVENCE,
Francujo

S-ro R. Eichholz, 2040 Springbank Rd, MISSISSAUGA, Ontario L5H 3N6, Kanado

Prof. V. P. Grigorjev, ul. Volodarskogo 38, kv. 67, MOSKVO X 172, Sovet-Unio

S-ro R. Haupenthal, Franz-Schubert-Str. 26, DUDWEILER 6602, Federacia Germanujo

S-ro A. J. Pettyn, 05-710 MILANÓWEK, Skrytka pocztowa 46, Polujo

4 Je la sama dato la tri Grupoj konsistas ĉiu el 15 anoj:

La Grupo IIIa (elirjaro: 1979) estas kompletigita per Bormann (31.46.76)

Haupenthal (45.61.76), Pettyn (38.57.76)

La Grupo Ia (elirjaro: 1982) estas kompletigita per de Diego (19.34.76)

La Grupo IIa (elirjaro: 1985) estas kompletigita per Duc Goninaz (33.46.76)

Eichholz (22.46.76), Grigorjev (22.55.76)

Elektovico

Grupo III. — Elirjaro 1979 — 14 anoj:

Albault, Bormann, Bugge-Paulsen, Haupenthal, de Kock, Lippmann, Mattos, Pettyn, Sadler, Setälä, Solzbacher, Støp-Bowitz, Vilborg, Wells. Unu vakanta posteno.

Grupo I. — Elirjaro 1982 — 15 anoj:

Atanasov, Auld, Bernard, Broadribb, de Diego, Downes, Kawasaki, Lapenna, Minnaja, Neergaard, Piĉ, Régulo Pérez, Rotkviĉ, Söderberg, Waringhien.

Grupo II. — Elirjaro 1985 — 15 anoj:

Boulton, Conterno, Duc Goninaz, Eichholz, Fernandez, Gregor, Grigorjev, Ĝuĝev, de Hoog, Mijake, Nakamura, Rosbach, Rossetti, Sevak, Tárkony.

K. La linio pri nova adreso de Rossetti mankas en iuj versioj de Aktoj II.

TABELO de ENHAVO

ANTAŬPAROLO	3
PARTO OFICIALA	5
1. Administraciaj Informoj	6
2. Oka Oficiala Aldono al U. V.	10
3. Baza Radikaro Oficiala	23
4. Rekomendoj de la Akademio	47
PARTO NEOFICIALA	49
1. Kompleta inventaro de la pasivaj participoj en “La Rabistoj”	50
2. Pri landnomoj	60
3. Diversaj konsultoj	67
ĜISDATIGO DE LA ADMINISTRACIA PARTO	69
TABELO de ENHAVO	71